**Speciala eldono Monda Socia Forumo 2010, Portalegro kaj tutmonde**

**Klimatŝanĝo, Kopenhago kaj la sekvo – Usono kun Obama – Monda nutriĝo kaj kampkulturo terorismo en Usono – Honduro post puĉo kaj elektoj – Haitio, kiel helpi?**

# Le Monde diplomatique en Esperanto

2010 Papera eldono de *Le Monde diplomatique en Esperanto* http://eo.mondediplo.com kaj de la *Monda Asembleo Socia (MAS)* http://mas-eo.org 8 paĝoj 2,50 €

## Ĉu Usono reformeblas?



PHOTOGRAPHIE GALERIE MAEGHT · ADAGP

ALEXANDER CALDER. – «Dents de scie» (1969)

„Segildentoj"

*LA POLITIKA BATALO servas ofte al personaj kontraŭecoj, al obsedaj rifuzoj. La necesoj de fronta batalo naskas tiam plej diversajn grupiĝojn motivatajn nur de la deziro detrui la saman celon. Ekde kiam la malamiko kuŝas tere, la problemoj komencas. Kaj kun ili la demando: kion fari nun? En la sinsekvo de la politikaj decidoj, la miskomprenoj kiuj favoris la iaman kartelon de kontraŭuloj forigendas; venas la elreviĝo. Antaŭ ne longa tempo la abomena malamiko revenas en la potencon. Lia tempo pasigita en la opozicio ne igis lin pli aminda.*

**de Serge Halimi**

TIA SKEMO JAM aplikiĝis en la Italio de s-ro Silvio Berlusconi. Venkita en 1995 de maldekstro samtempe pala, bunte miksita kaj senprojekta, li ree triumfis ses jarojn poste. Nuntempe, ankaŭ en la Francio de s-ro Nicolas Sarkozy, la cirkonstancaj aliancoj multiĝas, jen inter partioj (ekologiistoj, centristoj, socialistoj), jen inter eminentuloj (s-ro Dominique de Villepin, dum la tempo de alvoko kontraŭ la registara, apudis s-ron Olivier Besancenot, de kiu preskaŭ ĉio disigas lin). Unu sola celtabulo, la ŝtatestro. Bone, sed kion poste?

La triopo renkontiĝo, malcerta politiko, programita elreviĝo troviĝas ankaŭ en la usona aktualeco. Antaŭ jaro, la respublikana malvenko kaj la fino de la prezidanteco de s-ro George W. Bush kaŭzis momenton de ĝojego. Eĉ se parto de la elektantaro, kies sorto ne pliboniĝis, daŭre kredas je s-ro Obama, tiu entuziasmo ŝajnas esti pasinta. La intensigo de la milito en Afganio malesperigas la pacistojn, la reformo de la sansistemo troviĝas sub moderaj esperoj, same kiel la politiko pri medio. La juĝo „malpli ol bona, sed pli bona ol nenio" disvastiĝas kaj kreas malagrablan etoson. La politika pasio denove ŝanĝas la tendaron. Tia spiralo de enŝlimiĝo faciligas la influon de la premgrupoj kaj samtempe devigas demandi sin pri la reala potenco de la usona prezidanto. Li ne estas s-ro Bush, konsentite; s-ro Romano Prodi ankaŭ ne estis s-ro Berlusconi. Sed tio ne sufiĉas por scii kien s-ro Obama iras kaj por emigi sekvi lin. Nu, la lando suferas: la kvoto de senlaboreco fariĝis altega, en kompletaj kvartaloj apudas domoj konfiskitaj de siaj kreditoroj. La prezidanto ne laciĝas paroli, klarigi, provi konvinki; liaj paroladoj sinsekvas, ofte elokventaj. Kio restas de ili? Li kondamnas, en Kairo, la israelajn koloniojn; novaj stariĝas, li rezignacias. Li promesas ambician reformon de la sansistemo; la parlamentanoj mildigas ĝin, li kontentiĝas.

Iun tagon, li anoncas al la kadetoj de West Point ke li sendos novajn fortojn al Afganio; mallonge post tio li ricevas la Nobelpremion pri Paco. Tiu praktiko povus fariĝi skizofrenia. Sed la misharmonio de la situacioj trovas sian ŝajnkuracilon en nova ondo da vortoj kiu ekvilibrigas ĉiun eldiron per kontraŭa sugesto. Fine venkas preskaŭ ĉiam la rekantaĵo de „miaj progresemaj amikoj proklamas ĉi tion, miaj respublikanaj amikoj rebatas jenon; la unuaj postulas tro, la duaj ne konsentas sufiĉe. Mi elektas la mezan vojon".

S-ro Obama do kuraĝigis la kadetojn de West Point „reteni sin en la uzado de la armita forto"; li alvokis la ĵurianojn de Oslo mezuri „ la neceson de la forto pro la malperfekteco de la homo kaj la limoj de la racio". Tiuj devis ankaŭ mediti pri la ekzemplo de la prezidanto Richard Nixon kiu, spite al la „hororoj de la kulturrevolucio" akceptis renkonti Maon en Pekino en 1972. Senindulga pri la demando de homrajtoj, kia la iama respublikana ŝtatestro estis, tiu lia renkonto kostis al li tiom ke li devis mallonge poste konsolidiĝi per la ordono bombi la grandajn vjetnamiajn urbojn kaj per helpo al la puĉo de la generalo Augusto Pinochet ... Pri tio, tamen, s-ro Obama diras nenion al la oslaj ĵurianoj.Senmanke „centrista", li preferas saluti samtempe Martin Luther King kaj Ronald Reagan.

*(daŭrigo sur paĝo 3)*

## En tiu ĉi numero


Serge Halimi: Ĉu Usono reformeblas? (ĉefartikolo), p. 1 kaj 3-4

Hugo Cháves Frias: Parolado en la Pintkunveno de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Klimato, en Kopenhago, p. 1-3

Jacques Berthelot: Du miliardoj da viktimoj sur la tuta planedo – Por agrokultura modelo en la Sudo-landoj, p. 4

Stéphane Parmentier: Kaj subite revenas malsato, p. 5

Anne Vigna: Potenctransigo en Honduro, p. 6

Evo Morale: Alvoko, p. 7

Jean-Guy Allard: Teroristoj en Usono, p. 7

Daniel Mermet: Daniel Ben Saïd forlasis nin, p. 8


## Hugo Chávez Frias (prezidanto de Venezuelo): La socialismo estas la vojo por savi la planedon

*Parolado de Hugo Chávez Frías, prezidanto de Venezuelo, en la Pintkunveno de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Klimato, en Kopenhago, Danlando, la 16-an de decembro 2009*



SINJORO PREZIDANTO; Gesinjoroj; Ekscelencoj; geamikoj:

Mi promesas al vi ke mi ne parolos pli ol tiu kiu pleje parolis ĉi-posttagmeze ĉi tie.

Permesu al mi komencan komenton, kiun mi volis fari kiel parton de la antaŭa punkto kiun pritraktis la delegitaroj de Brazilo, de Ĉinio, de Barato kaj de Bolivio – ni petis la parolon, sed ne povis ricevi ĝin.

La reprezentantino de Bolivio diris – saluton, klare, al la kamarado prezidanto Evo Morales, kiu estas ĉi tie *(aplaŭdoj)*, prezidanto de la Respubliko Bolivio –, interalie la jenon – mi havas noton ĉi tie –: *„La teksto prezentita ne estas demokratia, ne estas inkluda"*.

Apenaŭ mi alvenis kaj ni eksidis, kiam ni aŭdis la prezidantinon de la antaŭa sesio, la ministrinon, diri ke venis dokumento ĉi tien, sed kiun neniu konas. Mi petis pri la dokumento, ankoraŭ ni ne

*(daŭrigo sur paĝo 2)*

*(daŭrigo de Hugo Chávez: Parolado)*

havas ĝin; mi kredas ke neniu scias pri tiu dokumento, *top secret*. Nun, la bolivia kamaradino certe diris tion: *„Ne estas demokratia, ne estas inkluda”*.

Nun, gesinjoroj, ĉu eble tio ne estas precize la realeco de tiu ĉi mondo? Ĉu ni troviĝas eble en demokratia mondo? Ĉu eble la monda sistemo estas inkluda? Ĉu ni povas esperi ion demokratian, inkludan, de la aktuala monda sistemo? Tio kion ni travivas sur tiu ĉi planedo estas imperia diktatoreco kaj de ĉi tie ni daŭre denuncos ĝin: For la imperian diktatorecon kaj vivu la popoloj, la demokratio kaj la egaleco sur tiu ĉi planedo! *(Aplaŭdoj)*

Tio kion ni vidas ĉi tie estas la reflekto de tio: ekskludo. Estas grupo de landoj kiuj kredas sin superaj al ni de la Sudo, al ni de la Tria Mondo, al ni la subevoluintoj, aŭ kiel diras la granda amiko Eduardo Galeano, ni la landoj surveturataj kvazaŭ de trajno kiu surveturis nin en la historio.

Do ni ne miru pri tio, ni ne miru: Ne estas demokratio en la mondo, kaj ĉi tie ni estas, refoje, antaŭ potenca evidento de la monda imperia diktatoreco.

Ĉi tien survenis du junuloj; bonŝance la ordigistoj estis decaj, iom da interpuŝiĝo ĉi tie, kaj ili kunlaboris, ĉu ne?

Tie ekstere estas multaj homoj, ĉu vi scias? Kompreneble ili estas tro por tiu ĉi salonego. Mi legis en la gazeto ke kelkaj estis arestitaj, kelkaj intensaj protestoj ĉi tie en la stratoj de Kopenhago, kaj mi deziras saluti ĉiujn tiujn homojn kiuj estas tie ekstere, plejparte junuloj (aplaŭdoj). Klare, ke estas junuloj en zorgo, mi kredas ke ili pravas, multe pli ol ni, pri la estonteco de la mondo.

Eblas diri, sinjoro Prezidanto, ke fantomo trakuras Kopenhagon, parafrazante Karlon Markso, la grandan Karlon Markso. Fantomo kuras tra la kopenhagaj stratoj, kaj mi kredas ke tiu fantomo moviĝas silente en tiu ĉi salonego, ĉi tie inter ni, metas sin sur la pasejojn, iras suben kaj supren. Tiu fantomo estas fantomo terura, preskaŭ neniu volas nomi ĝin. Tiu fantomo estas la kapitalismo! *(Aplaŭdoj)*; preskaŭ neniu volas nomi ĝin, ĝi estas la kapitalismo. Ĉi tie muĝas la popoloj, ĉi tie ekstere ili aŭdeblas.

Mi vidis kelkajn sloganojn kiuj estis pentritaj en la stratoj, kaj mi kredas ke tiujn sloganojn de tiuj junuloj, mi kredas ke kelkajn de ili mi aŭdis kiam la junulo kaj la junulino iris ĉi tien. Estas du da ili kiujn mi notis, aŭdeblis interalie, du potencaj sloganoj: Unu: *„Ne ŝanĝu la klimaton, ŝanĝu la sistemon” (aplaŭdoj)*, kaj mi transprenas ilin por ni: Ni ne ŝanĝu la klimaton, ni ŝanĝu la sistemon kaj, konsekvence, ni komencu savi la planedon. La kapitalismo, la detrua evolumodelo estas ĉesiganta la vivon, minacas ĉesigi definitive la homan specion.

La alia slogano vokas al pensado, multe kongrua kun la bankkrizo kiu trakuris la mondon kaj daŭre frapas ĝin, kaj kun la maniero en kiu la landoj de la riĉa Nordo helpis la bankistojn kaj la grandajn bankojn; sole Usono ..., bone, mi perdis la nombron, ĝi estas astronomia, por savi la bankojn. Ili diras en la stratoj la jenon: *„Se la klimato estus banko, ili estus jam savintaj ĝin”*, kaj mi kredas ke tio veras *(aplaŭdoj)*. Se la klimato estus kapitalisma banko, unu de la plej grandaj, la riĉaj registaroj jam savintus ĝin.

Mi kredas ke Obama ne alvenis, li ricevis la Nobelpremion pri Paco kvazaŭ en la sama tago en kiu li sendis pliajn 30.000 soldatojn por mortigi senkulpulojn en Afganio, kaj venas nun ĉi tien por prezentiĝi kun la Nobelpremio pri Paco, la prezidanto de Usono.

Usono havas la maŝinon por fari biletojn, por fari dolarojn kaj savis ..., bone, kredas esti savinta la bankojn kaj la kapitalisman sistemon.

Bone, tiun ĉi komenton marĝene, kiun mi volis fari tiam, kiam ni levis la manon por akompani Brazilon, Baraton, Bolivion kaj Ĉinion en ilia interesa pozicio, kiun Venezuelo kaj la landoj de la Bolivara Alianco dividas kun firmeco; sed, bone, ili ne donis la parolon al ni, do ne kalkulu tiujn ĉi minutojn, bonvole, Prezidanto, ili estis por tio *(aplaŭdoj)*.

Bone, imagu, ĉi tie mi havis la plezuron konatiĝi kun tiu ĉi franca verkisto, Hervé Kempf. Mi rekomendas tiun ĉi libron, mi rekomendas ĝin, ĝi estas en la hispana – ĉi tie estas Hervé –, ankaŭ en la franca, certe en la angla. *Kiel la riĉuloj detruas la planedon*, de Hervé Kempf. Pro tio diris Kristo: *„Estos pli facile ke kamelo trairu kudriltruon ol ke riĉulo eniru la ĉielan regnon”*. Tion diris Kristo nia Sinjoro *(aplaŭdoj)*.

La riĉuloj estas detruantaj la planedon. Ĉu ili eble pensas iri al alia kiam ili detruas tiun ĉi, ĉu ili havas planojn iri al alia planedo? Ĝis nun videblas neniu ĉe la horizonto de la galaksio.

Mi apenaŭ havis tiun ĉi librojn – ĝin donacis al mi Ignacio Ramonet, kiu estas ankaŭ ĉi tie en la salonego –, kaj mi finis la antaŭparolon aŭ antaŭparton, tiu ĉi frazo estas gravega. Kempf diras la jenon: *„Ni ne povos redukti la materian konsumadon tutmonde se ni ne faros tiel ke la potenculoj malsupreniros kelkajn ŝtupojn, kaj se ni ne kontraŭbatalas la malegalecon; estas necese ke al la ekologia principo, tiom utila nun por konsciiĝi: pensi tutmonde kaj agi loke, ni aldonu la principon kiun la situacio trudas: konsumi malpli kaj disdividi pli bone”*. Mi kredas ke tio estas bona konsilo kiun donas al ni tiu ĉi franca verkisto Hervé Kempf.

Bone, sinjoro Prezidanto, la klimata ŝanĝo estas sendube la plej detrua media problemo de tiu ĉi jarcento: inundoj, sekecoj, severaj pluvegoj, uraganoj, glacifandiĝoj, kresko de la marnivelo, acidiĝo de la oceanoj kaj ondoj de varmego, ĉion ĉi akrigas la efiko de la tutmondaj krizoj kiuj skurĝas nin.

La nuna homa aktiveco superas la sojlojn de daŭrigeblo kaj endanĝerigas la vivon sur la planedo; sed ankaŭ en tio ni estas profunde malegalecaj, mi ŝatus memorigi tion. La plej riĉaj 500 milionoj da personoj, kvincent milionoj! tio estas 7 %, sep elcentoj!, *seven* elcentoj de la monda loĝantaro. Tiu 7 % respondecas, tiuj 500 milionoj da plej riĉaj personoj, pri 50 % de la poluaj ellasaĵoj, dum la 50 % plej malriĉaj respondecas pri nur 7 % de la poluaj ellasaĵoj. Tio do vekas mian atenton, estas iom strange nomi ĉi tie Usonon kaj Ĉinion je la sama nivelo. Usono havas eble 300 milionojn da loĝantoj; Ĉinio havas proksimume kvinoble pli da loĝantoj ol Usono. Usono konsumas pli ol 20 milionojn da bareloj da petroleo ĉiutage; Ĉinio apenaŭ 5 aŭ 6 milionojn da bareloj ĉiutage. Oni ne povas postuli la samon al Usono kaj al Ĉinio. Ĉi tie estas temoj por diskuti. Estu ke ni la ŝtatestroj kaj ĉefministroj povu sidiĝi por diskuti vere, vere pri tiuj temoj.

Krome, sinjoro Prezidanto, 60 % de la ekologiaj sistemoj de la planedo estas difektitaj, 20 % de la terkrusto estas difektitaj. Ni estis indiferentaj atestantoj de la senarbarigo, de la transformado de teroj, de dezertiĝo, de la disputoj pri dolĉa akvo, de la poluado kaj de la perdo de biologia diverseco. La akra uzado de la tero superas je 30 elcentoj la kapablon regeneri ĝin. La planedo estas perdanta la kapablon de memreguliĝo, jen kion la planedo perdas; ĉiutage liberiĝas pli da tiaj rubaĵoj kiuj estas trakteblaj. La transvivado de nia specio martelas en la konscienco de la homaro.

Spite al la urĝo pasis du jaroj da intertraktadoj por interkonsenti pri dua periodo de promesoj laŭ la Protokolo de Kioto kaj ni partoprenas tiun ĉi rendevuon sen reala kaj signifa interkonsento.

Kaj, certe, pri la teksto kiu venas el nenio – kiel iuj kvalifikis ĝin, la ĉina reprezentanto –, Venezuelo diras kaj ni, la landoj de la ALBA, la Bolivara Alianco, diras ke ni ne akceptos, ĉar ni jam diris tion, iun ajn alian tekston kiu ne venas el la laborgrupoj, de la Protokolo de Kioto kaj de la Konvencio, tiuj estas la legitimaj tekstoj kiuj estis pridiskutataj kun tiom da intenseco en tiuj ĉi jaroj kaj en la lastaj horoj. Mi kredas ke vi ne dormis; krom ke vi ne tagmanĝis vi ne dormis, ĉu? Ne ŝajnas al mi logike ke eliru dokumento de la nenio, kiel vi diras.

La celo science subtenata redukti la ellason de poluaj gasoj kaj atingi interkonsenton de kunlaborado je longa tempo, ĉiurilate ŝajnas esti fiaskinta, por la momento. La kialo estas kiu? Ni ne havas dubon, la kialo estas la senrespondeca konduto kaj la manko de politika volo de la plej potencaj nacioj de la planedo. Neniu sentu sin ofendita, mi referencas la grandan José Gervasio Artigas, kiu diris: *„Per la vero mi nek ofendas nek timas”*; sed, en vero estas nerespondeca agado, de demarŝoj kaj kontraŭdemarŝoj, de ekskludo, de eliteca aliro al problemo kiu estas de ĉiuj kaj kiun solvi ni povas nur ni ĉiuj.

La politika konservativismo kaj la egoismo de la grandaj konsumantoj, de la plej riĉaj landoj montras altan sensentemon kaj mankon de solidareco kun la plej malriĉaj, kun la malsatantoj, kun la plej vundeblaj je malsanoj, je naturkatastrofoj.

Sinjoro Prezidanto, nepras nova kaj unueca interkonsento aplikenda, je absolute malegalecaj partoj, por la grandeco de iliaj kontribuaĵoj kaj ekonomiaj, financaj kaj teĥnologiaj kapabloj kaj kiu baziĝu sur la senrestrikta respekto al la principoj entenataj en la Konvencio.

La evoluintaj landoj devus fari devigajn promesojn, klarajn kaj konkretajn pri substanca malpliigo de siaj ellasaĵoj kaj plenumi devojn de financa kaj teĥnologia helpo al la malriĉaj landoj, por alfronti la detruajn danĝerojn de la klimatŝanĝo. En tiu senco, la aparta situacio de la insulŝtatoj kaj de la malpli evoluintaj landoj estas plene agnoskenda.

Sinjoro Prezidanto, la klimatŝanĝo ne estas la sola problemo kiu hodiaŭ tuŝas la homaron; aliaj skurĝoj kaj maljustaĵoj embuskas nin, la abismo kiu disigas la riĉajn kaj malriĉajn landojn ne ĉesis kreski, spite al ĉiuj Jarmilaj Celoj, la pintkunveno de Monterrey pri la financado, ĉiuj ĉi pintkunvenoj – kiel diris ĉi tie la prezidanto de Senegalio, denuncante grandan veron: promesoj kaj promesoj kaj promesoj neplenumitaj, kaj la mondo daŭrigas sian detruan iradon.

La ĉioma enspezo de la 500 plej riĉaj individuoj de la mondo estas pli alta ol la enspezo de la 416 milionoj plej malriĉaj personoj. La 2 miliardoj 800 milionoj da personoj kiuj vivas en malriĉeco, kun malpli ol du dolaroj tage, kaj kiuj estas 40 elcentoj de la tutmonda loĝantaro, tiuj kvardek elcentoj de la monda loĝantaro! ricevas nur 5 elcentojn de la monda enspezo.

Hodiaŭ mortas jare proksimume 9,2 milionoj da infanoj antaŭ ol atingi sian kvinan vivjaron, kaj 99,9 elcentoj de tiuj mortoj okazas en la plej malriĉaj landoj. La infanmorteco estas je 47 mortoj el mil vivnaskitoj; sed estas nur 5 el mil en la riĉaj landoj. La vivespero sur la planedo estas 67 jaroj, en la riĉaj landoj ĝi estas 79, dum en kelkaj malriĉaj nacioj ĝi estas nur 40 jaroj.

Krome ekzistas 1 miliardo kaj 100 milionoj da loĝantoj sen aliro al trinkakvo; 2 miliardoj 600 milionoj sen sanitaraj servoj, pli ol 800 milionoj da analfabetoj kaj 1 miliardo 20 milionoj da malsatantoj. Jen la scenaro de la mondo.

Nun, la kaŭzo, kio estas la kaŭzo? Ni parolu pri la kaŭzo, ni ne evitu la respondecojn, ni ne evitu la profundecon de tiu problemo. La kaŭzo, sendube – mi revenas al la temo –, de la tuta ĉi katastrofa panoramo estas la metabola, detrua sistemo de la kapitalo kaj ĝia enkorpigita modelo: la kapitalismo.

Jen citaĵo kiun mi ŝatus legi al vi, mallonge, de tiu granda teologo de Liberigo, Leonardo Boff, kiel ni scias, brazilano, nia amerikano.

Leonardo Boff diras, pri tiu temo, la jenon: *„Kio estas la kaŭzo? Ho! la kaŭzo estas la revo serĉi la feliĉon tra la materia akumulado kaj de la senfina progreso, uzante por tio la sciencon kaj la teĥnikon, per kiuj eblas ekspluati senlime ĉiujn riĉaĵojn de la Tero”*, kaj li citas ĉi tie Karlon Darvin kaj lian naturan selektadon, la supervivado de la plejfortuloj; sed ni scias ke la plejfortuloj supervivas super la cindroj de la plej malfortaj.

Johano Jakobo Rusoo – ni ĉiam memoru lin – diris la jenon: *„Inter la fortulo kaj la malfortulo la libereco subpremas”*. Ĝuste pro tio la imperio parolas pri libereco, estas la libereco por subpremi, por invadi, por murdi, por neniigi, por ekspluati, jen ĝia libereco. Kaj Rusoo aldonas la savofrazon: *„Nur la leĝo liberigas”*.

Estas kelkaj landoj kiuj ludas tiel ke ĉi tie ne estu dokumento, ĉar ili ĝuste ne deziras leĝon, ne deziras normon, ĉar la neekzisto de tiu normo permesas al ili ĝui sian ekspluatan liberecon, sian dispreman liberecon.

Ni faru fortostreĉon kaj premu, ĉi tie kaj sur la stratoj, por ke ĉi tie eliru devigo, eliru dokumento kiu devigu la plej potencajn landojn de la Tero! *(Aplaŭdoj)*

Leonardo Boff demandas sin, Prezidanto, – ĉu vi konatiĝis kun li, kun Boff? Mi ne scias ĉu Leonardo povis veni, mi konatiĝis kun li antaŭ nelonge en Paragvajo; ni ĉiam legis lin –: *„Ĉu finita Tero povas elteni senfinan projekton?”* La tezo de la kapitalismo: senfina disvolvismo, estas modelo detrua, ni akceptu tion.

Poste Boff demandas nin: *„Kion ni povas esperi de Kopenhago?”* Apenaŭ tiun simplan konfeson: Tiel kiel ni nun faras ni ne povas daŭrigi, kaj simpla propono: Ĉu ni ŝanĝu la direkton? Ni faru tion, sed sen cinikeco, sen mensogoj, sen duoblaj agendoj, sen dokumentoj kiuj venas el la nenio, kun la

vero antaŭe.

Ĝis kiam, ni demandas nin el Venezuelo, sinjoro Prezidanto, gesinjoroj, ĝis kiam ni permesos tiajn maljustaĵojn kaj malegalecojn? Ĝis kiam ni toleros la nunan internacian ekonomian ordon kaj la validajn merkatmeĥanismojn? Ĝis kiam ni permesos ke grandaj epidemioj kiel la VIH/aidoso neniigas tutajn loĝantarojn? Ĝis kiam ni permesos ke la malsatantoj ne povas nutriĝi nek nutri siajn proprajn idojn? Ĝis kiam ni permesos ke milionoj da infanoj mortas pro kuraceblaj malsanoj? Ĝis kiam ni permesos armitajn konfliktojn kiuj masakras milionojn da senkulpaj homaj estuloj, kun la celo ke la potenculoj alproprigu al si la resursojn de aliaj popoloj?

Ĉesu la agresoj kaj la militoj, ni popoloj de la mondo petas la imperiojn kiuj pretendas daŭrigi sian dominadon de la mondo kaj ekspluati nin! Ne pli da imperiaj bazoj nek ŝtatrenversoj! Ni konstruu ekonomian kaj socian ordon pli justan! Ni elradikigu la malriĉecon! Ni haltigu tuj la altajn nivelojn de ellaso, ni bremsu la poluadon de la medio kaj ni evitu la grandan katastrofon de la klimatŝanĝo! Ni aliĝu al la nobla celo esti pli liberaj kaj pli solidaraj!

Sinjoro Prezidanto, antaŭ proksimume du jarcentoj universala venezuelano, liberiganto de nacioj kaj antaŭulo de konsciencoj, lasis al la posteularo sentencon plenan de volo: *„Se la naturo kontraŭas, ni batalu kontraŭ ĝi kaj ni faru ke ĝi obeu al ni”*. Estis Simono Bolivaro, la Liberiganto.

El la bolivara Venezuelo, en kiu dum iu tago kiel hodiaŭ, certe, antaŭ dek jaroj precize, ni travivis la plej grandan klimatan tragedion de nia historio, la tragedion de Vargas, ĝi nomiĝas tiel; el tiu Venezuelo, kies revolucio provas konkeri la justecon por la tuta popolo, ebla nur sur la vojo de socialismo... La socialismo, la alia fantomo pri kiu parolis Karlo Markso, tiu iradas ankaŭ ĉi tie; ĝi estas pli precize kontraŭfantomo. La socialismo, tiu estas la direkto, tiu estas la direkto por savi la planedon, mi ne havas la plej etan dubon. Kaj la kapitalismo estas la vojo al la infero, al la detruado de la mondo.

La socialismo, el tiu Venezuelo kiu alfrontas pro tio la minacojn de la usona imperio, el la landoj kiuj kunformas la ALBA, la Aliancon Bolivaran, ni admonas, mi petas, kun respekto, sed el mia animo admonas, en la nomo de multaj sur tiu ĉi planedo, la registarojn kaj la popolojn de la Tero, parafrazante Simonon Bolivaro, la Liberiganton: se la detrua naturo de la kapitalismo kontraŭas, tiam ni batalu kontraŭ ĝi kaj faru ke ĝi obeu al ni, ni ne atendu kun krucitaj brakoj la morton de la homaro.

La historio vokas nin al unueco kaj al la batalo. Se la kapitalismo rezistas, ni estas devigataj batali kontraŭ la kapitalismo kaj malfermi la vojojn al savo de la homa specio. Tio devigas nin, levante la standardojn de Kristo, de Mahometo, de la egaleco, de la amo, de la justeco, de la humanismo, de la vera kaj plej profunda humanismo. Se ni ne faros tion, la plej mirinda kreaĵo de la universo, la homa estulo, malaperos, malaperos!

Tiu ĉi planedo havas miliardojn da jaroj, kaj tiu ĉi planedo vivis miliardojn da jaroj sen ni, la homa specio; tio signifas, ĝi ne bezonas nin por ekzisti. Nun, ni sen la Tero ne vivas, kaj ni estas detruantaj la *Pachamama*, kiel diras Evo, kiel diras niaj indiĝenaj fratoj de Sudameriko.

Fine, sinjoro Prezidanto, kaj por fini, ni aŭdu Fidel-on Kastro kiam li diris: *„Specio estas en danĝero estingiĝi: la homo”*[1]. Ni aŭdu Roza-n Luksemburgo kiam ŝi diris: *„Socialismo aŭ barbareco”*. Ni aŭdu Kriston, la Savanton, kiam li diris: *„Bonvenu la malriĉuloj, ĉar al ili estos la regno de la ĉieloj”*.

Sinjoro Prezidanto, gesinjoroj, ni estu kapablaj fari el tiu ĉi Tero ne la tombon de la homaro, ni faru el tiu ĉi Tero ĉielon, ĉielon de vivo, de paco kaj de frateco por la tuta homaro, por la homa specio.

Sinjoro Prezidanto, gesinjoroj, multegan dankon kaj bonan apetiton. *(Aplaŭdoj)*

*

*(daŭrigo de Serge Halimi: Ĉu Usono reformeblas?)*

**Turno**

ĈIO TAMEN BONE komencis. En novembro 2008, preskaŭ du usonanoj en voĉdona aĝo el tri (kaj 89,7 elcentoj de la enskribitaj elektantoj) arbitraciis la prezidantelekton. Ili portas al la Blanka Domo maltipan kandidaton kies vivvojo mem montras la amplekson de la estonta ŝanĝo: *„Mi ne havas la kutiman genealogion kaj mi ne pasigis mian karieron en la koridoroj de Vaŝingtono.”* Ĝuste pro tio li sciis mobilizi la junulojn, la nigrulojn, la hispanlingvanojn, kaj samtempe ne esperitan frakcion (43 %) de la blankulaj elektantoj. Kun elcentaĵo de voĉoj supera la tiu de Reagan dum ties elekto en 1980 (52,9 % kontraŭ 50,7 %), s-ro Obama povas pretendi kaj fieri je „mandato”. Cetere neniu kontestas ĝin. La malvenko de la respublikanoj estas kompleta. Ilia liberala filozofio, kiun la nova prezidanto resumis koncize kaj pedagogie – *„doni pli al tiuj kiuj havas plej multe, kaj antaŭkalkuli ke ilia prospero reŝprucos sur ĉiujn”* –, estas jam nenio ol amaso da ĉifonoj. Kaj la demokratoj disponas pri larĝa plimulto en ĉiu el la du ĉambroj de la Kongreso.

Tri monatojn antaŭ sia elekto, s-ro Obama avertis: *„La plej granda risko kiun ni povus preni estas uzi la samajn politikajn teĥnikojn kun la samaj ludantoj, kaj atendi de tio malsaman rezulton. En tiaj momentoj, la historio instruas nin ke la ŝanĝo ne venas de Vaŝingtono, ĝi venas al Vaŝingtono ĉar la usona popolo leviĝas kaj postulas ĝin.”* La agado de la lokaj aktivuloj devas do devigi skui la konservativajn pezojn de la ĉefurbo, la oficiala sidejo de ĉiuj premgrupoj de la lando. Jaron poste, dum oni perceptas nenian spuron de popola movado, oni jam ne nombras la leĝprojektojn blokitajn, mildigitajn, amputitajn de la „samaj politikaj teĥnikoj kaj la samaj ludantoj”.

Koncerne la genealogion, tiu de la nuna prezidanto tamen malharmonias kun tiuj de liaj antaŭuloj. Pro la videbla kialo kiun oni konas, sed ankaŭ ĉar estas malkutime ke la loĝanto de la Blanka Domo en sia junaĝo oferis la eblecon gajni multegan monon per praktikado de juro en Novjorko al la deziro helpi la loĝantojn de la malriĉaj kvartaloj de Ĉikago. Tamen, se oni ekzamenas kiujn membrojn de sia registaro s-ro Obama elektis, la noveco ŝajnas tuj malpli miriga. Por ministrino pri laboro proksima de la sindikatoj, s-ino Hilda Solis, kiu promesas rompon kun la antaŭaj politikoj, oni trovas ministrinon pri eksterlandaj aferoj, s-ino Hillary Clinton, kies diplomatiaj orientiĝoj malmulte disas de la pasinteco, sed ankaŭ ministron pri defendo, s-ro Robert Gates, rekte hereditan de la Bush-administracio. Aŭ financministron, s-ro Timothy Geithner, tro ligitan kun *Wall Street* por povi aŭ voli reformi, kaj konsilanton pri ekonomio, Lawrence Summers, arĥitekto de la politikoj de financa malregulado kiu kaŭzis ke la lando tuŝas apopleksion. Koncerne la „diversecon” de la skipo, ĝi ne estas sociologia. Dudek du el la tridek kvin unuaj nomumitoj de s-ro Obama estas diplomitoj de usona elita universitato aŭ de altranga brita kolegio.

Ekde la komenco de la 20-a jarcento, la demokratoj cedas, aparte inklinaj, al la teĥnokrata iluzio de kompetento, de pragmatismo, de regado de la plej bonaj (*„the best and the brightest”*), de elstareco, de fakuleco kiu devas trudi siajn volojn al politika mondo suspekta je konstanta demagogio. Tia filozofio al kiu, paradokse se konsideri lian vivvojon, aliĝas la prezidanto de Usono (ĉu por ne esti konfuzata kun nigrula aktivisto?) vidas la amasajn mobiliziĝojn, la „popolismon”, kun malfido. S-ro Obama esperis do dekomence ke la plej saĝa frakcio de la respublikanoj konsentos kun li por tiri la landon el la rutino. Kaj li streĉis al ĝi la manon. Vane. Li antaŭ nelonge komentis tiun akran rifuzon: *„Ni devis fari serion da malfacilaj decidoj sen ricevi la helpon de la opozicia partio, kiu, malfeliĉe, post direkti la politikojn kiuj kondukis al la krizo, decidis ŝarĝi ĝin sur la aliajn.”* Stranga formulo, sed rivela: ĝi prisilentas la prezidantelekton de 2008, ĉe kiu la respublikanoj ne „decidis” forlasi la regadon de la lando al aliaj; ili estis forpelitaj el la potenco fare de la elektantoj.

Ili ne eltenas lin. Pro tio ilia perforteco. En junio 1951 jam, demokrato, Harry Truman, okupis la Blankan Domon. Senhezite li dediĉis sin al batalo kontraŭ la komunismo kaj Sovetunio, al la defendo de la imperio kaj al la profitoj de General Electric. Tamen, el vidpunkto de grava parto de la respublikanaj voĉdonantoj, li estis perfidulo. La senatoro Macartio[2] elkriis jene: *„Oni komprenas jam nenion pri la nuna situacio se oni ne komprenas ke homoj en la plej altaj funkcioj de la ŝtato interkonsentas por konduki nin al la katastrofo? Tio estas tiom grandega konspiro ke ĝi polvigas ĉion kio estis antaŭe en la historio. Konspiro tiom fia ke, kiam oni senvualigis ĝin, ĝia respondeculo meritas esti por ĉiam malbenita de ĉiuj honestuloj.”* Dum kvar jaroj, tiu senatoro de Viskonsio terorigis ĉiujn en la lando kiuj estis progresemuloj, artistoj aŭ sindikatistoj, sed ankaŭ la ĉefajn respondeculojn de la ŝtato, inkluzive de militistoj.

Ni ankoraŭ ne estas tie. Tamen, la aero estas denove poluita de la paranojo de la membroj de la dekstrularo, ardigita de la *talk shows* en la radio, la seninterrompa „informado” de *Fox News*, la ĉefartikoloj de la *Wall Street Journal*, la fundamentismaj eklezioj, la deliraj onidiroj tra Interreto. Tia bruego invadas la spiriton kaj malebligas pensi pri io alia. Tiel, milionoj da usonanoj interesiĝantaj pri politiko estas konvinkitaj ke ilia prezidanto mensogis pri sia civila stato, ke li, ĉar naskita eksterlande, ne estis elektebla. Ili ĵuras ke lia venko, tamen akirita per ok milionoj kvincent mil voĉoj pli ol lia kontraŭulo, estas la rezulto de fraŭdo, de „grandega konspiro ...”.

La ideo havi kiel gvidanton homon kiu pasigis du jarojn en Indonezio en islama lernejo, iaman membron de la maldekstro, mondcivitanon, intelektulon, naŭzas ilin.[3] Ili kredas rokfirme ke la reformo de la sansistemo estas kiel antaŭludo por krei „morttribunalojn” taskitajn elekti tiujn malsanulojn kiuj rajtos je kuracado. Tiuj supertensiaj batalionoj estas la malmola kerno de la Respublikana Partio. Ili tenas en sia mano la elektitojn kun kiuj la bona centristo Obama esperis intertrakti pri sia relanĉa politiko, sia reformo de la malsanasekuro, la regulado de la financo.

La vaneco de tia espero montriĝis tuj. Malpli ol monaton post la enposteniĝo de la nova prezidanto, lia plano altigi la publikajn elspezojn ricevis la subtenon de neniu el la sepdek sep respublikanaj parlamentanoj en la Ĉambro de Reprezentantoj. En novembro estis la vico de la sansistema reformo: ĉi-foje, unu sola deputito de la opozicio aliĝis al la demokrata plimulto. En decembro, fine, la leĝaro destinita protekti la konsumantojn kontraŭ la misuzaj praktikoj de la kreditorganismoj estas decidita de la Ĉambro de Reprezentantoj sen eĉ unu respublikana voĉo. Ĉiufoje la prezentitaj tekstoj estis tamen amenditaj kun la espero ke la prezidanto povu prezenti ilin kiel „dupartiaj” ...

En la kazo de la financo, ankoraŭ neniu scias al kio similos la leĝo sub kiu li metos sian parafon. Efektive sufiĉus ke kvardek el la cent senatoroj kontraŭu por ke la diskuto daŭru senfine. Ĉar la respublikanoj estas kvardek, ĉiu el ili kaj ĉiu perfida demokrato povas altpreze pagigi sian subtenon. Unu el tiuj lastaj, s-ro Joseph Lieberman, kiu jam alvokis voĉdoni por s-ro John McCain en 2008, tiel obstrukcis la starigon de „publika opcio” destinita por la usonanoj sen medicina kovro. La privataj asekurkompanioj troviĝas inter la precipaj pagantoj de la senatoro Lieberman ...

La 28-an de septembro 2008, dum savplano por la bankoj konsentita de la kandidato Obama ebligis al ili urĝan helpon de 700 miliardoj da dolaroj, maldekstra parlamentano, s-ro Dennis Kucinich, alparolis siajn kolegojn: *„Ĉu ni estas la Kongreso de Usono aŭ la estraro de Goldman Sachs?”* La demando restas sufiĉe trafa por ke la usona prezidanto lastatempe juĝis utile precizigi: *„Mi ne faris la kampanjon por helpi la grandulojn de Wall Street.”* Tamen, en 2008, Goldman Sachs, Citygroup, JPMorgan, UBS kaj Morgan Stanley troviĝis inter la dudek precipaj pagantoj por lia kampanjo.[4] Frazo de la ĵurnalisto William Greider resumas la situacion: *„La demokratoj troviĝas antaŭ dilemo: ĉu ili povas servi la publikan intereson sen malkontentigi la bankistojn kiuj financas iliajn kampanjojn?”*[5]

Ĉu Usono reformeblas? Oni asertas ke ĝia sistemo karakteriziĝas per „ekvilibro de la potencoj”. Ĝi konsistas reale en multegaj ŝtupoj kie regas la dolaro. En 2008, milionoj da junuloj lanĉis sin en la politikan batalon esperante ke kun tiu prezidanto jam nenio estos kiel antaŭe. Sed jen,

---

1 Vd Fidel Castro Ruz: *La dialogo de civilizacioj. Parolado farita en Rio-de-Ĵanejro dum la Konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Medio kaj la Disvolvado, la 12-an de junio 1992 ...*, Monda Asembleo Socia (MAS), elhispanigita de Amparado Cisnero Rovira, 2009, p. 8 – 12.

2 Joseph McCarthy. -vl

3 Vd „Stratagème de la droite américaine, mobiliser le peuple contre les intellectuels [Strategiero de la usona dekstrularo, mobilizi la popolon kontraŭ la intelektuloj]”, *Le Monde diplomatique*, majo 2006.

4 Laŭ la listo starigita de la „Centro por Respondeca Politiko” (Center for Responsive Politics). http://www.opensecrets.org/pres08/contrib.php?cycle=2008&cid=N00009638

5 William Greider, „The Money Man's Best Friend”, *The Nation*, Novjorko, 30-a de novembro 2009.

ankaŭ li kondutas kiel fimakleristo, aĉetas voĉon kiu alie mankus al li, flirtas kun elektito kiun li malestimas. Ĉu li povus fari alie? La personeco de homo neniam pezas multe fronte al la tiraneco de la strukturoj, precipe kiam la opozicio montriĝas histeria kaj kiam la „popola movado" resumiĝas je dispecigitaj sindikatoj, nigrulaj aktivuloj alelektitaj de la registaro kaj je memadmiraj blogistoj kiuj kredas ke la batalado okazas malantaŭ la klavaro. Nu, en Usono, ŝanĝeto en progresema direkto de la aferoj postulas preskaŭ perfektan viciĝon de la planedo. Male, por redukti la impostojn de la riĉuloj, Reagan eĉ ne bezonis plimulton de la respublikanaj parlamentanoj ...

La biografio de s-ro Obama naskis miskomprenon. Unuflanke, ĉar ĝi koncentris sur lin ĉiujn pafojn kaj ĉiujn atendojn. Aliflanke, ĉar tiu prezidanto de Usono jam delonge ne similas al la radikala adoleskanto kiun li priskribas en siaj *Memoraĵoj*. Tiu kiu partoprenis en la socialistaj konferencoj, indigniĝis pro la kontraŭkomunista ŝtatrenverso de 1965 en Indonezio, agis en Harlemo por asocio proksima de s-ro Ralph Nader. Li ankaŭ havas jam nenion komunan kun la nigrula aktivulo kiu *„por eviti esti konsiderata perfidulo, zorge elektis siajn amikojn. La plej aktivajn nigrulajn studentojn. La eksterlandajn studentojn. La* chicanos*. La marksistajn profesorojn, la strukturecfeministojn kaj la poetojn de punk-rock. Ni fumis cigaredojn kaj portis ledajn bluzojn. Nokte, en la dormejoj, ni diskutis pri la novkoloniismo, pri Frantz Fanon, pri eŭropa etnocentrismo kaj pri patriarĥeco."*[6]

Por la respublikanoj, tiu pasinteco pruvas ke la homo estas danĝera, fremda al la individuisma kulturo de la lando, komplezema al „la malamikoj de libereco" kaj preta, por komenci, „socialigi la usonan sansistemon". Parto de la membroj de la demokrata partio siavice esperas ke ilia prezidanto, kiu en la momento elrevigas ilin, ne hezitos, ekde kiam li povos, realigi pli progreseman politikon; kaj ke tia estas lia volo. La antaŭtimo de la unuaj nutras la esperon de la aliaj. Tamen, por parafrazi la esprimon de la ĵurnalisto Alexander Cockburn, la maldekstro kiu inspektas la intestojn de la tekstoj prezentitaj en la Kongreso por malkovri en ili la plej etan spuron de venko, scias ke la tempo estas kalkulita: la parlamentaj elektoj de venonta novembro, kiuj povas okazi en malgaja ekonomia etoso, malpliigos la vicojn de demokrataj elektitoj.

Oni decide tro parolas pri s-ro Obama. Tiu homo ricevis la trajtojn de demiurgo kiun oni kredas kapabla malsovaĝigi la sociajn fortojn, la instituciojn, la interesojn. Tiu malmatura personigo de la potenco karakterizas ankaŭ Francion kaj Italion, sed tie la diablo troviĝas aliflanke; li nur falu kaj la maldekstro estos savita ... Antaŭ proksimume duona jarcento, la usona historiisto Richard Hofstadter popularigis la esprimon „paranoja stilo" por celi tian politikan humoron. Tiam li pensis ĉefe pri la makartista dekstro kaj iliaj tujaj sekvantoj, sed li opiniis ankaŭ ke lia pratipo trovos dum la jaroj multajn aliajn aplikojn.

Ĝuste tie ni estas. La florado de individuismo, la intelekta pigreco, la histeria devojiĝo de la debatoj, la detrua rolo de la komunikiloj, ankaŭ la malfortiĝo de la marksismo, ĝeneraligis la iluzion kiu, laŭ la klarigo de Hofstadter en 1963, *„la malamiko ne estas, male al la opinio de ni ĉiuj, submetita al la granda meĥaniko de la historio, viktimo de sia pasinteco, de siaj deziroj, de siaj limoj.*[7] *Ĝi estas granda libera aganto, aktiva, diableca.* (...) *Ĝi fabrikas krizojn, lanĉas bankajn bankrotojn, kaŭzas depresiojn, faras katastrofojn kaj sekve ĝuas kaj poste profitas de la mizero kiun ĝi kaŭzis."*[8] Animanto de ultrakonservativa radio, Rush Limbaugh, rebatas ke certaj defendantoj de s-ro Obama vidas lin kiel la mesion. Li ne malpravas. Sed kial li persistas denunci ĉiutage la antikriston?

Envere, la „miraklo" de la elekto de novembro 2008 povus esti ke ĝi memorigis al ni ke mirakloj ne ekzistas. Kaj ke la sorto de Usono ne konfuzendas kun la personeco de homo nek kun la volo de prezidanto.

**Serge HALIMI.**

6 Barack Obama, Dreams from My Father, Three Rivers Press, Novjorko, 2004, p. 100.

7 Ĝuste pri tiu eraro de la „oficiala marksismo", reginta en la pereintaj ŝtatoj de la sovetia tendaro, traktas libroj ĵus aperintaj en Esperanto : „Oktobra Revolucio kaj la sekvo", Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300 -07-6; „La bildo de la homo en kapitalismaj socioj kaj en marksismaj sciencoj", Monda Asembleo Socia (MAS), ISBN 978-2-918300-15-1, 2009 ; kaj nerekte ankaŭ Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, Monda Asembleo Socia (MAS) ISBN 987-2-918300-09-0, 2009 ; kaj Ekonomia krizo – analizoj n-ro 2,, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-12-0 -vl

8 Richard Hofstadter, The Paranoid Style in American Politics, Alfred Knopf, Novjorko, 1966, p. 32.)

*

## DU MILIARDOJ DA VIKTIMOJ SUR LA TUTA PLANEDO

### Por agrokultura modelo en la Sudo-landoj

*„La problemo pri malsato jam estis maltrankviliga kiam nutraĵprezoj estis moderaj kaj la mondo travivis prosperan periodon. Sed la tutmonda nutraĵa krizo (2006-2008), sekvata de la ekonomia krizo, kreis katastrofan situacion", konstatas s-ro Daniel Gustafson, estro de la UN-Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo (ONA). Sed la Tutmonda Nutraĵprogramo (TNP) reduktis sian buĝeton de 6 ĝis 3 miliardoj da dolaroj inter 2007 kaj 2008. Laŭ la ONA 39 miliardoj da dolaroj jare sufiĉus por duonigi la nombron de malsatantoj en 2015. Tio estas malpli ol dekono de la subvencioj donitaj al agrokulturo en la riĉaj landoj. En la momento de la Tutmonda Pintkunveno pri nutraĵa sekureco, kiu okazas la 16- kaj 18-ajn de novembro en Romo, fundamenta problemo staras: Kia agrokultura modelo permesos nutri la naŭ miliardojn da homoj, kiuj vivos sur la planedo en 2050 ?*

**de Jacques BERTHELOT**

PLENUMI la nutraĵajn bezonojn de la naŭ miliardoj tricent milionoj da homoj vivontaj en 2050 sur la Tero, estas veto apriore ne evidenta; sed por la plej malriĉaj landoj, kie estas atendata forta demografia kresko, la defio estas aparte timinda. Ĉar tie ja vivas la plejmulto de la kronikaj subnutratoj, kaj eksplodis en 2007 kaj 2008 la „malsato-popolribeloj" rilataj al la rapida kresko de la agrokulturaj prezoj. Tie, la plej bonaj teroj, nun ne sufiĉe ekspluatataj manke de sufiĉaj financoj, estas pli kaj pli akaparataj de okcidentaj landoj, kiuj zorgas pri sia importado de agro-brulaĵoj, aŭ de aziaj kaj arabgolfaj landoj, kiuj deziras certigi al si longdaŭran nutraĵprovizadon, prognozante ĝeneralan altiĝon de agrokulturaj prezoj. Kaj finfine, ĉar tie ja la klimata varmiĝo plej multe reduktos la potencialajn agrokulturajn rendimentojn – de 15 ĝis 30 % en subsahara Afriko, laŭ la Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo (ONA).

La subita altiĝo de agrokulturaj prezoj en 2007 kaj 2008 elstarigis ilian grandan variemon kaj detruis la dogmon pri „memregulado de merkatoj". Fronte al varpostulo stabila en mallonga daŭro, produktado varias laŭ la klimathazardoj, kio estigas grandan prezo- kaj enspezo-varion – tial precize la ŝtatoj, jam de la egiptaj faraonoj, ĉiam reguladis la importadon kaj funkciigis stoko-politikojn.

Malgraŭ tio, en la agrokultura sektoro, liberaligo de interŝanĝoj estis trudata al la ŝuldantaj landoj, komence de la 1980-aj jaroj, de la Internacia Mon-Fonduso (IMF) kaj de la Monda Banko; en 1994, premoj de la agronutraĵaj firmaoj por malaltigi prezojn de agrokulturaĵoj rezultigis, ene de la Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK), la Interkonsenton pri Agrokulturo (IPA). Tiu kompromiso, kiu havis kiel *„longdaŭran celon* (...) *iom-postiomajn kaj gravajn reduktojn de la monsubtenoj kaj protektoj al agrokulturo"*, rompis la GATT-interkonsentojn de 1947, kiuj ja ne malhelpis la protekton kontraŭ importoj, kvankam ĝi permesis subvenciojn al eksportaĵoj.

Intertraktitaj inter la Eŭropa Unio kaj Usono, antaŭ ol esti vastigitaj al ĉiuj MOK-membroj, la IPA-reguloj estas aparte maljustaj al evolulandoj. Tio ĉefe veras kiam temas pri la difino de vorto „dumpado"[1]. Laŭ la MOK, povas esti akuzata pri dumpado lando, kiu subvencias eksportanton, sed ne lando, kiu eksportas je la prezo de la interna merkato – eĉ se tiu prezo estas sub la reala kosto, pro internaj subvencioj. Ekde 1992, la EU kaj Usono do grave malkreskigis siajn internajn prezojn, por daŭre eksporti sen esti akuzataj pri dumpado.

#### Kreskigi la nutraĵproduktadon

KROME, La distingo, kiun faras la MOK inter la subtenoj permesataj („verda skatolo") kaj tiuj, kiuj devos reduktiĝi ĉar „distordas la komercon" („bluaj" kaj „oranĝaj" skatoloj)[2] estas mistifikado; la sinsekvaj reformoj de la komuna agrikultura politiko (KAP) en la EU kaj de la *Farm Bill* en Usono de 1990, tamen esence baziĝas sur tiu trompaĵo. Dum la intertraktado de la Doha Rondo[3], Usono kaj la EU konsentis redukti siajn « distordajn » subtenojn de respektive 80 % kaj 70 % kompare kun ilia nivelo permesata dum la periodo 1995-2000, kondiĉe ke la evolulandoj malfermos sufiĉe por iliaj eksportaĵoj siajn neagrikulturajn merkatojn kaj servo-merkatojn; sed ili poste ne ĉesis friponi pri tiuj „distordaj" subtenoj. Usono taksis siajn je 8,5 miliardoj da dolaroj en 2007, dum ili vere atingis 28,2 miliardojn da dolaroj; same, la EU anoncis 43,1 miliardojn da eŭroj por 2005-2006 (lasta jaro kalkulita), kontraŭ reala valoro de 72,9 miliardoj da eŭroj[4]! Konklude, ilia redukto-propono ne konvinkas.

Tiuj du grandaj eksportantoj havas kiel kunkulpulon la sekretariaton de la MOK kaj la prezidanton de ĝia komitato pri agrokulturo intertraktado. Krome, malgraŭ ke la apelacia organo[5] de la MOK decidis, la 3-an de decembro 2001 – kun la afero de la kanadaj lakto-produktoj – , ke dumpado signifas ankaŭ la internajn subvenciojn al eksportataj produktoj kaj, la 3-an de marto 2005 – kun la afero de la usona kotono –, ke la usonaj rektaj fiksaj monhelpoj ne apartenas al la „verda skatolo", tiuj decidoj estas tamen konsiderataj tempe limigitaj, kaj ne enkondukos veran ŝanĝon de la regularoj.

Sciante, ke unu miliardo da homoj suferas pri kronika subnutrado kaj ke du aliaj miliardoj estas viktimoj de mankoj pri proteinoj aŭ oligoelementoj, la ONA taksas, ke necesas kreskigi la mondan nutraĵan produktadon je 70 % antaŭ 2050. Dum la tutmonda pintkunveno pri nutrado, en 1996, du ĉefaj decidoj estis tiucele proponitaj : unuflanke, jaraj alŝutoj de publika mono,de la nordaj landoj al la sudaj landoj, por ilia agrokulturo – unue taksitaj je 25 miliardoj da dolaroj, poste je 44 miliardoj, tiuj alŝutoj nun estas nur 7,9 miliardoj da dolaroj; aliflanke, liberaligo de la komercaj interŝanĝoj. Sed, kvankam tiom gravaj monaj alŝutoj estus ja bonvenaj, ili ŝajnas ne kredindaj en la aktuala situacio; kaj pri la liberaligo de interŝanĝoj, ĝi rezultigus samtempe grandan redukton de la buĝetaj enspezoj kaj ruiniĝon de la kamparanoj en la evolulandoj.

Ja, vera disvolviĝo de la plej malriĉaj landoj, kiaj tiuj de subsahara Afriko, ne povas ekzisti sen starigo iliaprofite de tiu protektodona agrokulturo, kiu tiel bone sukcesis por la Eŭropa Unio kaj por Usono. Estas cetere rimarkinde, ke ju pli disvolvitaj la landoj, des pli ili protektas sin kontraŭ importado de bazaj nutraĵproduktoj, kaj tio spite al averaĝa agrokultura doganimposto malpli alta ol tiu de la evolulandoj. Verdire tiu averaĝa doganimposto signifas nenion. Juĝu mem: kvankam ĝi atingas 22,9 % sur la 2.202 agrokulturaj tarif-linioj de Bruselo (EU) (kaj 10,5 % se oni enkonsideras la importaĵojn je favora tarifo) la averaĝa doganimposto sur cerealoj restas 50 % en la EU, kontraŭ 5 % en la Ekonomia kaj Mona Okcidentafrika Unio (UEMOA); se temas pri laktopulvoro: 87 % kontraŭ 5 %; pri sukeraj produktoj: 59 % kontraŭ 20 %; pri frostigitaj viandoj (bovaĵo, porkaĵo kaj kokaĵo): 66 % kontraŭ 20 %.

Cetere, ju pli disvolvitaj estas landoj, des malpli granda estas la proporcio de importitaj bazaj nutraĵpro-

1 Dumpado estas vendo de komercaĵoj je prezo pli malalta ol la produkt- aŭ akirkosto por ruinigi konkura(j)n kompanio(j)n aŭ simple vendi pli por akiri valuton. Ni preferas tiun formon proponitan de F. Munniksma en sia Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj, Kluwe-Deventer, 1974, al la kutima", ĉar ĝi kongruas kun la esperanta vortfarada sistemo: dumpi, dumpado. Laŭ Munniksma, dumpado estas: „ofertado de varoj aŭ servoj al la eksterlanda merkato kontraŭ prezoj sub la normala valoro por vendi pluson da varoj aŭ subfosi la normalan prezonivelon de la konkurencaj firmaoj" -jmc

2 La MOK klasifikas subvenciojn laŭ kategorioj, en „skatoloj" diverskoloraj: verda por senlime permesitaj helpoj; blua por la nur tolerataj helpoj; oranĝa por la evitendaj aŭ reduktendaj helpoj.

3 La Doha Rondo estas trijara ciklo de intertraktado, sub egido de la MOK. Ĝi temis precipe pri „liberaligo de la internacia komerco", kaj eksplicite celis disvolvadon de tio, kion oni antaŭe nomis „La Tria Mondo". La interministra konferenco de Doho (Kataro) okazis de la 9-a ĝis 13-a de novembro 2001 -jmc.

4 *„Usono ne povas redukti siajn agrokulturajn subvenciojn en la Doha Rondo", „La Eŭropa Unio ne povas redukti siajn internajn agrokulturajn subvenciojn en la Doha Rondo"*, respektive la 2-an de aŭgusto kaj 2-an de septembro 2009, www.solidarité.asso.fr.

5 Nomo ofte donita al la Organo por Solvado de Konfliktoj (OSK) de la MOK. Vd Monique Chemillier-Gendreau, „Ĉu ilo por mastrata tutmondiĝo?", *Le Monde diplomatique*, novembro 2007

duktoj. Koncerne la periodon 2001-2004, ekzemple, tiu proporcio, ĉe cerealoj, kiu estas 1,4 % en Usono kaj 5,9 % en EU, estas 12,6 % en la evolulandoj, 19,3 % en subsahara Afriko kaj 18,9 % en Okcidenta Afriko. Ĉe laktaj produktoj, ĝi estas 2 % en Usono kaj 2,7 % en EU, kontraŭ 10,3 % en evolulandoj kaj 39 % en Okcidenta Afriko.

La efikeco de la protekto al agrokultura produktado bone elstaras se oni komparas Kenjon kaj la UEMOA-n : doganimposto sur laktopulvoro en la unua pasis de 25 % en 1999 al 35 % en 2002 kaj al 60 % de 2004, dum ĝi restis 5 % en la dua. Kenjo estas kreskanta neta eksportanto de laktoproduktoj, kun interna konsumado de 112 litroj por ĉiu loĝanto; inverse, la importado de la lakto-ekvivalento estas 64 % de la laktoprodukto de Okcidenta Afriko, kaj la loĝanta konsumado estas nur tridek kvin litroj.

Tiuj faktoj montras, ke oni devas reorganizi ĉiujn agrokulturajn politikojn, naciskale same kiel en la IPA, laŭ la principo de nutraĵa suvereneco[6] : ĉiu lando (aŭ grupo de landoj) devus havi rajton difini sian agrokulturan kaj nutraĵan politikon laŭplaĉe, se ĝi nur ne malutilas al la aliaj, uzante ekzemple dumpadon – kaj en tiu praktiko oni inkluzivu la internajn nerektajn helpojn, kiajn la subvenciojn al la brutaro-nutraĵo.

Konsideri ke la EU ne plu bezonas protekti sian agrokulturan merkaton, krom kontraŭ la importaĵoj devenantaj de landoj, kiuj ne respektas hommedion kaj la minimumajn socialajn normojn – , kiel opinias la verduloj kaj la socialistoj en la Eŭropa Parlamento, kaj ankaŭ multaj Neregistaraj Organizaĵoj (NRO) – ŝajnas tre danĝere. La altaj doganimpostoj trudataj de Bruselo por la fundamentaj nutraĵoj malaltiĝus se interkonsento estus farita en la kadro de la Doha Rondo kaj eĉ pli, se la interkonsento pri libermerkato kun la komuna merkato de la Sudo (Mercosur)[7] sukcese finintertraktiĝus, kiel deziras Hispanujo – prezidonta la EU en la unua semestro 2010. Sed la pluvivo de la eŭropaj agrokulturistoj estas ligita al ilia regado de la interna merkato, sur kiu ili vendis 77,5 % de siaj produktoj inter 2005 kaj 2007.

### Rezigni pri la ĝeneraligita dumpado

ESTAS DO en la intereso de la EU refondi la KAP kaj la IPA surbaze de nutraĵa suvereneco, kaj produkti siajn nutraĵojn por brutaro, rezignante pri la ĝeneraligita dumpado[8]. Tio ne malhelpos ilin eksporti, kiam la mondaj agrokulturaj prezoj estos pli altaj ol la internaj prezoj sen subvencioj. Konkrete, eblas fiksi profitdonajn prezojn, garantiitajn per varieblaj impostoj sur importaĵoj, por ke la agrokulturistoj, kiuj estas proksimaj de la Eŭropunia meza produktokosto, ne bezonu subvenciojn por vivi. Subvencioj, limigitaj kaj varieblaj laŭ la membro-ŝtatoj, estu nur por la kamparanoj, kies kostoj estas pli altaj, aŭ kiuj, kvankam ili tre malmulte produktas, bezonas subtenon pro sociaj aŭ mediaj kialoj (multfunkcieco)[9].

Koncerne kvantojn, kial ne fiksi « plafonojn » laŭ produkto kaj disdoni ilin inter la Dudek sep Landoj[10], strebante al justa ekvilibro inter la avantaĝoj ricevitaj de ĉiu lando kaj la neceso antaŭenigi multfunkcian agrikulturon, samtempe minimumigante la transportkostojn ? Tia reformo estus inverso de la absurda malregulado nun farata de la Eŭropa Komisiono.

Sed la neceso refondi siajn agrokulturajn politikojn eĉ pli trudiĝas al la evolulandoj, se oni konsideras ilian kreskantan nutraĵan deficiton – kiu atingis, sen konsideri fiŝaĵon, 13,3 miliardojn da dolaroj en 2007. Konsiderante, ke la reduktado de la protekto kontraŭ importado kaj de la distordaj agrokulturaj subvencioj estas la interŝanĝ-mono de la Unio kaj de Usono, en la intertraktadoj de la Doha-rondo, kontraŭ malfermiĝo de la merkatoj de neagrokulturaj produktoj kaj de servoj de la evolulandoj, tiuj ĉi havas gravan atuton enmane : ili povas misfamigi la difektan interpretadon de la IPA-reguloj fare de la EU kaj Usono, kaj ankaŭ iliajn grandkvantajn subtaksadojn, kaj persekuti ilin ĉe la MOK. Se ili sukcesos klare pruvi, ke iliaj redukt-ofertoj estas nur iluzioj, la evolulandoj ne plu estos devigataj malfermi siajn neagrokulturajn kaj priservajn merkatojn, kaj spaco aperos por refondi la agrokulturajn politikojn kaj la IPA surbaze de nutraĵa suvereneco.

**Jacques BERTHELOT.**

6 Gérard Choplin, Alexandra Strickner kaj Aurélie Trouvé, Souveraineté alimentaire. Que fait l'Europe ?, Syllepse, Parizo, 2009.

7 Argentino, Brazilo, Paragvajo kaj Urugvajo. Venezuelo estas aliĝanta, kaj Bolivio, Kolombio, Ĉilio, Ekvadoro kaj Peruo havas statuson de „asociiĝintaj landoj".

8 Vd 2.

9 Koncepto aperinta fine de la 1990-aj jaroj. Krom ĝia klasika produkto-funkcio, „multfunkcia" agrokulturo devus havi ekologian kaj socian dimension.

10 La EU -jmc.

*

## DU MILIARDOJ DA VIKTIMOJ SUR LA TUTA PLANEDO

## Kaj subite reaperas malsato

*„la problemo pri malsato jam estis maltrankviliga kiam nutraĵprezoj estis moderaj kaj la mondo travivis prosperan periodon. Sed la tutmonda nutraĵa krizo (2006-2008), sekvata de la ekonomia krizo, kreis katastrofan situacion", konstatas s-ro Daniel Gustafson, estro de la UN-Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo (ONA). Sed la Tutmonda Nutraĵprogramo (TNP) reduktis sian buĝeton de 6 ĝis 3 miliardoj da dolaroj inter 2007 kaj 2008. Laŭ la ONA 39 miliardoj da dolaroj jare sufiĉus por duonigi la nombron de malsatantoj en 2015. Tio estas malpli ol dekono de la subvencioj donitaj al agrokulturo en la riĉaj landoj. En la momento de la Tutmonda Pintkunveno pri nutraĵa sekureco, kiu okazas la 16- kaj 18-ajn de novembro en Romo, fundamenta problemo staras : Kia agrokultura modelo ebligos nutri la naŭ miliardojn da homoj, kiuj vivos sur la planedo en 2050 ?*

**de Stéphane PARMENTIER**

„MALSATO ne estas natura plago", substrekas s-ro Olivier De Schutter, speciala raportisto de Unuiĝintaj Nacioj (UN) pri rajto je nutraĵo[1]. Ĝi esence estas rezulto de neadaptitaj politikaj decidoj. Tiu konstato estas samtempe terura kaj saviga. Terura pro ĝia amplekso: unu miliardo da homoj estas ne sufiĉe nutrataj en 2009 laŭ la UN-Organizaĵo por Nutrado kaj Agrokulturo (ONA)[2], du miliardoj da homoj estas misnutrataj; naŭ milionoj mortas pro tio ĉiujare[3].

Saviga, ĉar ĝi implicas, ke oni povus eviti nutraĵkrizon per aliaj sociaj decidoj. Ne mankas anstataŭaj solvoj, teknike realismaj kaj efikaj, kiuj konsistigas alian disvolvo-modelon. Tamen, ilia identigo implicas tiun de la kaŭzoj de hodiaŭa marasmo.

Unue, la ĵusa pliintensigo de la krizo: cent milionoj da kromaj viktimoj de malsato en unu jaro. Tiun katastrofon provokis la subita altigo de internaciaj agrokulturaj prezoj en 2007 kaj 2008, diverse reeĥataj sur la internaj merkatoj de la koncernaj landoj[4]. La nivelo escepte malalta de stokoj ludis esencan strukturan rolon en tiu altiĝo. Laŭ la agronomiisto inĝeniero Marcel Mazoyer : *„Kialo de la stoko-malkresko estas la prezmalaltiĝo dum la 25 antaŭaj jaroj. Tiel okazas ĉiun 25-an aŭ 30-an jaron, de ducent jaroj. De 1975 ĝis 2005-2006, prezoj de la agrokulturaj krudmaterialoj sur la internacia merkato estis proksimume sesonigitaj. Stokejoj iom post iom malpleniĝis. Koncerne cerealojn, la stokoj estis falintaj je malpli ol 16 % de la monda jara produktado kaj konsumado. Je tiu nivelo, sufiĉas incidenteto por eksplodigi la prezojn"*.

### Amasa kampara senlaboreco

FACILAS identigi la fajreron, kiu flamigis la krizon: rapida kresko de postulo de agrobrulaĵoj en Usono (2004-2005) kaj en Eŭropo, premanta sur jam tre malaltaj stokoj, tiu premo de la postulo estigis senteblan tutmondan prezaltiĝon de multaj bazaj produktoj, inter kiuj maizo kaj vegetaĵaj oleoj (palmo, sojo, kolzo) respektive uzataj por produktado de etanolo kaj biodizelo. Sur la templimaj merkatoj de Ĉikago, Novjorko, Kansas City kaj Minneapolis, amasa enmiksiĝo de spekulaj fondusoj[5] rapidigas kaj pliigas la altiĝon de kurzoj, kaj poste de prezoj. Pliintensiga faktoro estas la kreskanta prezo de petrolo, kiu alten tiras tiun de agrokulturaj ĥemiaj aldonaĵoj, de transporto kaj energio.

Sed la kreskanta nombro de malsatviktimoj ne havas nur tiujn kialojn. Ĝi unue estas rezulto de ilia ega malriĉeco, kiu estas ĉiutaga realaĵo, sed des pli kiam la nutraĵprezoj „ekflamiĝas". Sed 80 % de homoj trafitaj per malriĉo estas kamparanoj: 50 % etaj kultivistoj, 10 % bredistoj kaj 20 % „senteraj" kamparanoj[6]; kaj la 20 % urbaj viktimoj de malsato, ili estas parte ekskamparanoj migrintaj en urbojn pro espero de pli bona vivo. Estiĝas do la demando: kial tiom da kamparanoj vivas en malriĉeco ?

La respondo ŝajnas malĝoje simpla: en la internaciaj, naciaj kaj regionaj kompetentaj instancoj, kiuj decidas la agronomiajn, komercajn kaj aliajn politikojn, decidoj estas ĝenerale farataj sen konsideri kamparanojn. Atestas tion la decidoj preskribataj kadre de la Monda Organizaĵo pri Komerco (MOK), de la struktur-adaptaj politikoj de la Monda Banko (MB) kaj de la Internacia Mon-Fonduso (IMF), de la libermerkataj interkonsentoj kaj de la agro-eksportaj politikoj de iuj ŝtatoj aŭ regionoj, kiel Usono, EU, Brazilo …

Tiuj decidoj inkluzivas malfermiĝon de limoj, forlason de la ofertmastrumo (ĝia adaptado al postulo), detruon de la stokig-mekanismoj por rikoltplusoj, kaj de la reguligaj komercaj oficejoj. Plenumo de tiuj decidoj rekte kontraŭas la interesojn kaj fundamentajn rajtojn de kamparanoj. Egaligante, iom post iom, la internajn prezojn kun la internaciaj prezoj, ĝi igas nestabilaj kaj necertaj la enspezojn de kamparanoj. Abrupte ekmetante en konkurenco agrokulturojn, kies rendimentaj diferencoj estas grandegaj, ĝi favorigas ĝeneraligon de nedaŭraj interŝanĝoj de agrokulturaj produktoj, de kio subitaj ekflamoj de importado estas tipaj ekzemploj.

Landskale tia kresko signifas nekutiman kvantokreskon de la koncernaj produktoj, kombinitan kun forta prezmalaltiĝo. Estigante neelteneblan konkurencon al la lokaj produktoj, ĝi provokas disfalon de la internaj prezoj kaj agrokulturaj enspezoj. Tiele, ĝi malriĉigas kamparanojn, detruas la tradiciajn vivmodelojn de la etaj produktistoj kaj rezultigas amasan kamparan senlaborecon. Tiu fenomeno tute ne estas marĝena. Inter 1984 kaj 2000, sepcent sesdek sep subitaj ekflamiĝoj de importado estis registritaj en deksep evolulandoj. Kondukante al falo de la produktado en la koncernaj landoj, tiuj importadoj ankaŭ pliigas ilian nutraĵ-deficiton. Rezultas el tio kreskinta dependeco de importaĵoj kaj de evoluo de la internaciaj prezoj, por certigi sekurecon de loĝantaroj[7]. Oni do povas percepti, kiom la ĵusa prezekflamiĝo estis katastrofa en landoj, kiuj estas netaj importantoj de nutraĵoj.

La malekvilibro de la frontantaj fortoj en la agronutraĵ-produktoĉeno ankaŭ kontribuas al kampara malriĉo. Kapableco de intertraktantoj pezi sur la intertraktado de la provizkondiĉoj varias laŭ la grado de koncentriteco de la sektoro. Sed tiu de la agrokultura produktado estas ege malpli koncentrita ol la aliaj. Oni taksas je du miliardoj sescent milionoj da homoj la koncernatan loĝantaron, kaj je kvarcent kvindek milionoj la nombron de agrokulturaj laboristoj. Samtempe, dek firmaoj regas duonon de la semooferto kaj tri aŭ kvar firmaoj la plimulton de la mondaj interŝanĝoj de ĉiu produkto. Komerc-distribuado, ja, estas lasita al kvar aŭ kvin kompanioj de superbazaroj, kiuj dividas inter si la merkaton en ĉiu disvolvita lando; kaj kiuj kreskas kaj iĝas potencaj en la sudaj landoj.

Alfrontitaj almonte kaj alvale al veraj „botelkoloj" (trafikŝtopejoj), kamparanoj havas ununuran vojon : akcepti la postulojn de la aliaj ĉeneroj. Ankaŭ tie, malekvilibro de fortoj havos gravajn konsekvencojn : ĝi ebligas al distribuantoj aĉeti malmultekoste, trudas al kamparanoj prezojn konstante sub iliaj produktokostoj, kaj tiras malsupren la salajrojn, jam malaltajn, de la laboristoj de grandaj industriaj plantejoj.

Malriĉiĝo-faktoroj estas multaj: nealiro al tero, historie tre malegala disdivido de la produktiveco-kresko

1 T. Nagant, « 'La faim n'est pas une fatalité', pour Olivier De Schutter », Monda Nutraĵ-Programo, http://one.wfp.org.

2 „L'état de l'insécurité alimentaire dans le monde 2008", ONA, Romo, 2009.

3 „L'origine de la crise alimentaire mondiale", Science Actualités, printempo 2008, www.cite-sciences.fr.

4 Vd Dominique Baillard, „Kiel la tutmonda cereal-merkato elbridiĝis", *Le Monde diplomatique*, majo 2008.

5 Daniel G. de La Torre Ugarte kaj Sophia Murphy, „The global food crisis : Creating an opportunity for fairer and more sustainable food and agriculture systems worldwide", Heinrich Böll Foundation, Berlino, 2008.

6 Paula Cusi Echaniz, „Risques alimentaires et économiques en Méditerranée", Centre international de hautes études agronomiques méditerranéennes (Ciheam) (Internacia Centro de mediteraneaj agronomiaj altaj studoj), Parizo, 2009

7 La MOK portempe permesas al la ŝtatoj, kiuj suferis subitan ekflamiĝon de importado altigi doganimpostojn aŭ trudi kontingentojn. Sed la metitaj kondiĉoj igas tiujn protektilojn neuzeblaj, aŭ neefikaj.

estigita de la „da revolucio”[8], kaj ankoraŭ redukto de la publika disvolvohelpo. Tiuj faktoroj tamen havas ion komunan: rezigno fare de la „politikpovo”arantii la disvolvon de daŭrema kamparana agrokulturo.

### Agro-ekologiaj solvoj

ĈESIGI malsaton implicus radikalan direktoŝanĝon, cele garantii tiun disvolvon kadre de nutraĵ-suvereneco (vd „Por agrokultura modelo de la sudaj landoj”). Tia vojo necesigas stabilajn kaj profitdonajn prezojn por ĉiuj kamparanoj en la mondo. Necesas por tio efikaj ofertomastrumaj sistemoj je internacia, nacia kaj regiona niveloj, bazitaj sur konstanta alĝustigo de produktado, kaj variebla protekto ĉe la landlimoj. Konsekvence, ekvilibrigi la interajn rilatojn ŝajnas plej grave, tiom plifortigante la povon de la kamparanaj organizaĵoj, kiom reduktante tiun de la agronutraĵa industrio kaj de la grandaj distribuaj komercistoj. Pli multe investi estas fundamente, sed ne en ajnaj kondiĉoj. La jardekoj da subteno al modelo de industria intensa agrokulturo montris siajn limojn. Agro-ekologio montras solvojn, kiuj ebligas kreskigi produktivecon, respektante la planedon, kaj limigante la efikon al klimatŝanĝo.

En aprilo 2008, preskaŭ sesdek registaroj subskribis raporton pri „svolvado (IAASTD)”[9]. Ellaborita de kvarcent fakuloj el la tuta mondo, tiu plurfaka raporto alvokas reorienti kaj pliigi la financadon de ekologia agrokultura revolucio. Ĝi postulas aplikon de politikoj, kiuj garantios aliron al tero, al semoj kaj al trinkebla akvo. La neatendita nombrokresko de viktimoj de malsato en 2009 instigas ja meti fundamentan demandon: kiun agrokulturan kaj nutraĵan modelon ni volas?

**Stephane PARMENTIER**

8 En la 1969- kaj 1970-aj jaroj, „verda revolucio” transformis la agrikulturon de la sudaj landoj, aparte en Latinameriko kaj en Azio, per intensigo de teknikoj kaj uzo de altrendimentaj cerealoj.

9 Publikigita la 15-an de aprilo 2008, tiu pritaksado estis kondukita sub aŭspicioj de tridek registaroj kaj tridek asocioj de la „civila socio”. Kvin UN-agentejoj kunlaboris: la Organizaĵo pri Nutraĵo kaj Agrikulturo (ONA), la UN-Programo por Disvolvado (UNPD), la UN-Programo por Hommedio, la UN-organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo (Unesko) kaj la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS). Raporto-sintezo estas ĉe: www.agassessment.org.

*

## KIEL BLANKIGI ŜTATRENVERSON

### Kontraŭdemokratia potenctransigo en Honduro

*La elektoj de la 29-a de novembro 2009, ekster la konstitucia kadro okazigitaj de la instancoj estiĝintaj el la ŝtatrenverso de la 28*-a de junio 2009 kontraŭ la prezidanto Manuel Zelaya, la elektoj de la 29-a de novembro 2009 metis la k*andidaton de la Nacia Partio, s-ron Porfirio Lobo, en la potencon. Tuj poste, ignorante la violenton de la subpremado kontraŭ la opozicio, Usono urĝe agnoskis la validecon de la voĉdonado.*

**de Anne VIGNA**

LA POLICISTOJ kolektas la nigrajn krucojn, forlasitajn en la paniko de la manifestaciantoj. Ĉiu de ili portas nomon de persono mortigita dum la kunvenoj organizitaj kontraŭ la ŝtatrenverso *(golpe)* kiu, la 28-an de junio 2009, renversis la prezidanton Manuel Zelaya. Kelkajn minutojn antaŭe, dum tiu 29-a de novembro, tago de la prezidantelekto, la amaso avancis pace ĝis la centro de San Pedro Sula, due plej granda urbo de la lando. La ĉeesto de la internacia gazetaro neniel malhelpis la perfortan disigon de la manifestacio. La policistoj arestis kvardek ses homojn, batis ĉiujn kiuj troviĝis je atingopovo de iliaj gumklaboj kaj detruis la krucojn, kiuj estis fariĝintaj simboloj de la Fronto de Rezistado kontraŭ la ŝtatrenverso (FRCG).

La sceno havis neniom da eksterordinara. Tagon antaŭ la elekto, la bilanco de la subpremado altiĝis al tridek mortintoj, kvar mil ducent arestoj kaj sennombraj vunditoj. Poste, trideko da aktivuloj de la FRCG estis mortigitaj en la kadro de „ondo da planita teroro”, laŭ la Komitato de Defendo de la Homrajtoj en Honduro (CODEH). [1] Aldoniĝas la multaj atestoj pri perfortitaj virinoj, de respondeculoj konstante minacataj je morto kaj de loĝantaro terorizata de armea violento. La subpremado venkis la grandajn manifestaciojn kiuj paralizis la landon dum kvin monatoj. *„Por la momento jam ne necesas esprimiĝi en la strato, ĉar tio estas tre danĝera*, klarigas s-ro Rafael Alegría, reprezentanto de Via Campesina en Honduro. Ni eniris novan etapon de la batalo.”

Tiu nova etapo komenciĝis kun la prezidantelekto, supozita ĉesigi la politikan krizon. Tiu elekto, en kiu venkis per 56 % de la voĉoj s-ro Porfirio Lobo, de la Nacia Partio, estis organizita de la kontraŭleĝaj instancoj, sen la antaŭa restarigo de la prezidanto Zelaya, kiel planis la interkonsento Tegucigalpo-San-Joseo subskribita la 30-an de oktobro, sub la protekto de s-ro Thomas Shannon, usona ŝtat-subsekretario por la okcidenta hemisfero (Latinameriko).

La elektokampanjo okazis dum, ekde oktobro, du dekretoj malpermesis al la civitanoj *„partopreni en publika kunveno”* kaj al la komunikiloj *„instigi al socia anarĥio”*. Ĉar ne okazis reveno al la konstitucia ordo, la FRCG alvokis al bojkotado de la voĉdonado kaj al *„popola elirmalpermeso”* anstataŭ al manifestado de forto. *„Ni decidis por prudento. Manifestacii ĉe tridek mil armitoj kiuj patroladis dum tiu tago estus frenezaĵo”*, opinias s-ro Juan Barahona, unu el la kunordigantoj de la FRCG.

Tio ebligis al la plej multaj reprezentantoj de la internacia gazetaro skribi ke la rezistado kalmiĝis kaj ke ĝi reprezentas jam nur etan parton de la loĝantaro. *„La Fronto neniel adaptiĝis*, klarigas s-ro Gustavo Irías, politika analizisto en la Centro de Studoj por la Demokratio. *Ni pensas ke minimume la duono de la loĝantaro partoprenas en la rezistado. Zelaya estis populara prezidanto, eĉ se nur pro tio ke li duobligis la minimuman salajron. Aliflanke la metodoj de la faktaj instancoj eksterordinare ŝokis la loĝantaron.”*

### „Amasa partopreno” ne tiom amasa

TIU ANALIZO de la FRCG baziĝas sur la nombro da organizaĵoj el kiuj ĝi konsistas : sindikataj, feministaj, ekologiistaj, studentaj, indiĝenaj kaj terkulturistaj ktp. La movado iusence profitis tion kion oni nomas en Honduro la „efikon Miĉ”. Post la samnoma detrua uragano, en 1998, la popolaj organizaĵoj devis anstataŭi la instancojn kaj realigi la rekonstruadon. Tiam ili ricevis senprecedencajn fontojn kaj de tiam ludas rolon en la socio, eĉ se ilia politika reprezentiĝo ankoraŭ ne ekzistas.

La ŝtatrenverso estis la eksplodilo de nacia movado kiu nun federas tiujn organizaĵojn. *„Sed la granda surprizo estis la forta partopreno de la plejmalriĉuloj*, rakontas la sociscienciistino María Elena Méndez. *Speciale de tiuj kiuj vivtenas sin per eksterregula ekonomio, la moviĝantaj komercistoj, la etmetiistoj, la patrinoj de familioj ...”* Same analizas s-ino Gilda Rivera, direktoro de la Centro de la Rajtoj de la Virino (CDM) : *„La movado nur grandiĝis ekde la 28-a de junio. Ĝi estas pulvo kiu fariĝos vera forto de opozicio kontraŭ la venonta registaro.”*

Sen reala politika programo, la FRCG organiziĝas en la momento ĉirkaŭ kelkaj ŝlosilvortoj. La devizo restas la kontestado de la prezidantelekto kaj, speciale, de la partoprenkvoto de 61 % anoncita de la plej supera elektotribunalo, vespere de la rezultoj. Tiu nombro efektive ebligis al la puĉistoj paroli pri *„amasa partopreno”* kaj tuj postuli la agnoskon de s-ro Lobo kiel nova ŝtatestro.

Prudenta, kaj sendinte neniun observanton, la „internacia komunumo” – escepte de Usono kaj de ties proksimaj regionaj aliancanoj, Kolombio, Peruo kaj Panamo – ne agnoskis tiun rezulton, je dek poentoj super tiu de la prezidantelekto de 2006. Fakte la voĉnombrado faris kelkajn surprizojn, kiel montris la usona ĵurnalisto Jesse Freeston, de la usona televidĉeno *The Real News*. [2] Li eniris la salonon de voĉnombrado de la elektotribunalo, li filmis la rezultojn afiŝitajn sur ekrano : 49 % de partopreno. En la sama momento, la prezidanto de la tribunalo anoncas 61 %, *„ciferon kiun li mem inventis”*, laŭ la ĵurnalisto, kiu pridemandis plurajn membrojn de la institucio.

Financata de Vaŝingtono tra la Nacia Fondaĵo por Demokratio (NED en la angla), Hagamos Demoracia realigas siavice rapidan nombradon kaj anoncas 47 % da partopreno. Dek tagojn post la elekto, la tribunalo devis adaptiĝi kaj rekonis ke ĝi estis nur 49 %. La partizanoj de s-ro Zelaya siavice taksas, sur la bazo de siaj nombradoj ĉe la elveno el mil kvarcent voĉdonejoj, je 25 %. *„Oni neniam scios la veron, ĉar la voĉdoniloj estas en la manoj de la instancoj, kiuj jam manipulis la rezultojn*, opinias s-ino Laura Carlsen, direktoro de la programo *America’s policy Program* de la *Center for International Policy*. [3] *Sed la internacia komunumo ne povas agnoski elekton kiu okazigis gravajn rompojn de homrajtoj.”*

Igi la Internacian Pun-Kortumon (IPK) de Hago rekoni tiujn ekscesojn estas nun dua batalo de la FRCG por mallegitimigi la elekton sur la monda scenejo. *„Honduro subskribis la traktaton de Romo kaj, sekve, ĉiuj civitanoj, inkluzive de armeanoj, akuzeblas de ĝia jursistemo”*, memorigis la prezidanto Zelaya dum interparolado ĉe loka radio. [4] La Internacia Misio de Observado de Homrajtoj denuncis antaŭ la Kortumo speciale la fakton ke la ĉefa instiganto de la subpremado estas neniu alia ol s-ro Billy Joya, respondeculo pri la malapero de centoj da aktivuloj en la 1980-aj jaroj. [5] Longan tempon fuĝinte, poste juĝita en Honduro pro la malapero de dek ses aktivuloj, li estis nomumita speciala konsilisto pri sekureco de la puĉista registaro de s-ro Roberto Micheletti.

„La rezistado estas en tre vundebla pozicio. La faktaj instancoj faras la filaboron por la venonta registaro per eliminado de la opozicio. La malaltiĝo de la internacia atento por la lando estas granda danĝero por la gvidantoj de la movado”, aldonas s-ino Carlsen, mem agresita en Honduro ĉar ŝi kritikis la elektojn en la televidkanalo Al-Ĵazira.

La rezistad-movado, jam malmulte atentata de la eksterlanda gazetaro, estas ankaŭ fortenata de la hondura pejzaĝo. Ĉar la aliro al Intereto estas tre malmulte evoluinta kaj la komunikiloj en la manoj de la ekonomiaj grupoj favoraj al la ŝtatrenverso, la registaro bezonis nur neŭtraligi dekkvin [6] por regi la informadon. En la mateno de la puĉo, la armeanoj invadis plurajn instalaĵojn por kapti la aŭdvidan materialon, la telefonojn, la komputilojn kaj tranĉi la komunikadon. La signalo de la ĉefaj internaciaj televidoj alireblaj per kablo – Telesur (Venezuelo), Cubavisión (Kubo), Guatevisión (Gvatemalo), Teletica (Kostariko) kaj CNN en la hispana (Usono) – estis ankaŭ blokitaj. Dum la elektokampanjo, la televido Canal 36 ne havis la rajton elsendi. La instancoj, tamen subtenataj de la katolika eklezio, trude dissendas pere de ĝi ... erotikajn filmojn, anstataŭ la planitaj programoj.

S-ro Esdras Amado López, direktoro de la televido, estas videble elĉerpita. Li montras la grafikon de lia frekvenco, konstante perturbata per satelitaj interferencoj kiuj limigas ĝian elsendadon nur al la ĉefurbo. „Kaj eĉ tie, diras li, la sono fariĝas tro malklara, kaj jen, denove, la ekrano nigriĝas, ofte por kelkaj minutoj. Ili ludas per niaj nervoj ĉe ĉiu elŝalto.” La elektoj de la cenzuro ŝajnas hazarda : jen raportaĵo pri la misio de Amnestio Internacia, jen rekte sendata komento de televidanto, jen anonco de manifestacio kiun faras ĵurnalisto, kiuj estas tuŝitaj. Esplorado de ilia konduto lasas nenian dubon pri la strategio de la instancoj : la organizaĵoj de defendo de la gazetaro nombris „ok komunikilojn fermitajn kaj dudek al kiuj oni malebligis funkcii ; tridek vunditojn, dek kvar arestitojn kaj unu mortinton inter la ĵurnalistoj”. [7] Kiel multaj kolegoj, s-ro Amado López ne ŝatas paroli pri la mortminacoj kiujn li ricevas. Sed, la tagon antaŭe, li rakontis al la televido ke nekonataj kapuĉitoj estis mitralintaj la domon de lia patrino.

La timo kaj la tensio palpeblas. Pensi pri estonteco malfacilas por aktivuloj ĉefe en zorgo pro la armea ĉeesto ĉe la pordoj de sia domo. „La batalo estis ĉiam riska en tiu ĉi lando, memorigas la sindikatisto Carlos Reyes. Sed la puĉo nur fortigis niajn demokratiajn aspirojn.”

La alibio de la ŝtatrenverso – la organizado, fare de la prezidanto Zelaya, de popola konsultado pri ebla reformo de la Konstitucio decidita en 1982, sub la prezidanteco de s-ro Roberto Suazo Córdova, kiam la armeo havis la veran potencon – fariĝis la standardo de la FRCG. [8] „Se la Konstituciiganta Asembleo estis jam postulo antaŭ la ŝtatrenverso, ĝi estas hodiaŭ neceso. Tiu krizo evidentigis politikan sistemon kiu rifuzas dividi la potencon”, analizas s-ro Juan Almendares, iama rektoro de la universitato de Tegucigalpo.

Kvankam la unueco estas akirita pri tiu ĉi punkto, ĝi ne nepre ekzistas pri la rimedoj kiujn la rezistad-movado devas uzi. Ĉu ĝi devas transformiĝi en politikan partion kaj gajni sian reprezentecon per la urnoj ? La Demokratia Unio (UD), konata kiel maldekstra, preferas tiun opcion : *„Nia partio ekzistas, ni disponigas ĝin al la Fronto”*, insistas la deputito Marvin

Ponce. Sed la UD perdis parton de sia bazo kiu partoprenis en la prezidant-elekto – do legitimigante ĝin. Fortigi la partion de la prezidanto Zelaya, la Liberalan Partion, ankaŭ ne estas la celo. *„Tiu partio estas ankaŭ tiu de Roberto Micheletti, ni devas jam nun forlasi ĝin”*, opinias s-ro Nelson Avila, la iama ekonomia konsilisto de s-ro Zelaya.

La plej granda timo, sine de la rezistado, estas ĝuste ke ĝi devas konformiĝi al la hondura politika ludo. *„La politikaj partioj havas tiom malbonan famon ke la homoj asimilas ilin aŭtomate kun korupto, komentas s-ro Alegria. Tiu movado kiu batalas por demokratio devas inventi ion alian.”*

**Se la sango fluos, ĝi fluu por Konstituciiga Asembleo**

Dum unu el la asembleoj de la Nacia Fronto de Popola Rezistado (nova nomo de la FRCG), la postuloj svarmas. Ĉeestas la Komitato de Virinoj de la maquiladoras (viclaboraj fabrikoj) kaj la Ĝenerala Konfederacio de Laboristoj (CGT). La du organizaĵoj kontraŭas la reformon de la laborleĝo sub la prezidanteco de s-ro Zelaya. La virinoj postulas specifajn disponojn por la sano en tiuj fabrikoj, la CGT preferus insisti pri la salajroj. Hodiaŭ, dum la virinoj deklaras sin pretaj batali por Konstituciiga Asembleo kune kun la plimultaj sindikatoj, se iliaj postuloj estas konsiderataj, unu el ili ekparolas : „La le*rnado de demokratio devas komenci ĉi tie, en niaj kvartaloj, sine de la familioj. Ĉar la sango ankoraŭ fluos, ĝi fluu por Konstituciiga Asembleo kiu ekskludas neniun !”*

**Anne VIGNA.**

*

## PUBLIKA ALVOKO DE LA PREZIDANTO DE BOLIVIO,

## EVO MORALES AYMA

**al ĉiuj defendantoj de nia planedo**

por la *Monda Konferenco de la Popoloj pri la Klimatŝanĝo kaj pri la ratoj de la Patrino Tero en Koĉabambo, Bolivio, de la 20-a ĝis la 22-a de aprilo 2010*

Konsiderante ke la klimatŝanĝo estas reala minaco por la eksistado de la homaro, de la vivantaj estaĵoj kaj de nia Patrino Tero tia kian ni konas ĝin hodiaŭ,

Konstatante la gravan minacon por la insuloj, la marbordaj zonoj, la glaciejoj de Himalajo, de Andoj kaj de la montaroj de la mondo, la polusoj de la Tero, la varmaj regionoj kiel Afriko, la akvofontoj, la loĝantaroj tuŝataj de kreskantaj naturkatastrofoj, la plantoj kaj la animaloj, kaj por la ekologia sistemo ĝenerale;

Emfazante ke la personoj plej tuŝataj de la klimatŝanĝo estos la plej malfriĉaj de la planedo, ke iliaj hejmoj kaj iliaj vivfontoj detruiĝos kaj ke ili devos elmigri kaj serĉi rifuĝejon;

Konfirmante ke 75 % de la historiaj ellasoj de forcejaj gasoj aperis en la malracie industriigitaj Nordaj landoj;

Konstatante ke la klimatŝanĝo estas la produkto de la kapitalisma sistemo;

Bedaŭrante la fiaskon de la Kopenhaga Konferenco pro la tiel nomataj „evoluintaj” landoj kiuj ne volas agnoski la klimatan ŝuldon kiun ili havas al la evolulandoj, la estontaj generacioj kaj al la Patrino Tero ;

Asertante ke por garantii la plenan respekton de la Homrajtoj en la 21-a jarcento necesas agnoski kaj respekti la Rajtojn de la Patrino Tero;

Reasertante la bezonon batali por la klimata justeco;

Agnoskante la bezonon fari urĝajn agadojn por eviti pli gravajn damaĝojn kaj suferojn por la homaro kaj por la Terpatrino, kaj restarigi la harmonion kun la naturo;

Konfidante ke la popoloj de la mondo, gvidataj de la principoj de solidareco, justeco kaj respekto por la vivo, kapablos savi la homaron kaj la Terpatrinon;

Celebrante la internacian tagon de la Patrino Tero,

La Registaro de la Plurnacia Ŝtato Bolivio kunvokas la popolojn, la sociajn organizaĵojn kaj la defendantojn de la Patrino Tero de la tuta mondo, kaj invitas la scienculojn, la esploristojn, la juristojn kaj la registarojn kiuj volas labori kun siaj popoloj, al la Monda Konferenco de la Popoloj pri la Klimatŝanĝo kaj la Rajtoj de la Patrino Tero, kiu okazos de la 20-a ĝis la 22-a de aprilo en Koĉabambo, Bolivio.

La celoj de la Monda Konferenco de la Popoloj pri la Klimatŝanĝo kaj la Rajtoj de la Patrino Tero estas:

– 1. Analizi la strukturajn kaj sistemajn kaŭzojn kiuj estigas la klimatŝanĝon kaj proponi fundajn disponojn kiuj ebligas la bonfarton de la tuta homaro en harmonio kun la naturo.

– 2. Diskuti kaj interkonsenti pri la projekto de la Universala Deklaro de la Rajtoj de la Patrino Tero.

– 3. Interkonsenti proponojn pri la novaj engaĝiĝoj por la Protokolo de Kioto kaj por la projektoj de Decidoj de la Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri la Klimatŝanĝo kiuj gvidos la agadojn de la registaroj kiuj defendas la vivon dum la intertraktadoj pri la klimatŝanĝo kaj en ĉiuj instancoj de la Unuiĝintaj Nacioj, pri jenaj punktoj:

a) la klimata ŝuldo,

b) la rifuĝantaj migrantoj pro la klimatŝanĝo,

c) la reduktado de la gasellasoj,

ĉ) la adaptado,

d) la transigo de teĥnologio,

e) la financado,

f) la arbaroj kaj la klimatŝanĝo,

g) la komuna vizio,

ĝ) la indiĝenaj popoloj kaj

h) aliaj punktoj.

– 4. Labori pri la organizado de la Monda Referendumo de la Popoloj pri la Klimatŝanĝo;

– 5. Analizi kaj starigi Agadplanon por antaŭenigi la starigon de Tribunalo pri Klimata Justeco;

– 6. Difini la strategiojn de agado kaj de mobilizado por la defendo de la vivo fronte al la klimatŝanĝo kaj por la Rajtoj de la Patrino Tero.

*Bolivio, la 5-an de januaro 2010*

*Evo Morales Ayma*

*Prezidanto*
*de la Plurnacia Ŝtato Bolivio*

*

## La VERDULOJ atentigas

*Ni atentigas niajn legantojn ke dum la venonta* ***Universala Kongreso en Havano, en julio 2010****, okazos kunveno de la asocio de* ***verdulaj Esperantistoj AVE*** *(tago kaj horaro ankoraŭ ne estas determinitaj), dum kiu ni esperas renkontiĝi kun ĉiuj samideanoj kiuj interesiĝas pri la sorto de nia planedo. Proponoj por tiu renkontiĝo fareblas en la retejo de la verduloj ĉe "AVE-anoj" <manfred@westermayer.de>.*

*

## „Helpu Kubon helpi”

### ĉar „Kubo faras helpon kiu vere alvenas”

La membroŝtatoj de la Bolivara Alianco por la Popoloj de Nia Ameriko (ALBA) volas kontribui per komuna strategio al mez- kaj long-tempa rekonstruado de Haitio. Al tio apartenas la konstruado de malsanulejoj kaj instalaĵoj de ellaborado de trinkakvo, kiel la prezidanto de Venezuelo, Hugo Chávez, anoncis marĝene de konferenco de la ALBA-ministroj pri eksterlandaj aferoj, lastan dimanĉon en Karakaso. Samtempe li kritikis refoje la procedon de Usono en Haitio. Ekz-e ŝipoj el Venezuelo kun helpliveraĵoj por Haitio ne deŝarĝeblas, ĉar la usonaj trupoj rifuzas al ili albordiĝi. Kun aludo al la usona malsanulejŝipo, kiu ankras antaŭ Haitio, Chávez raportis ke kuracistoj sur la ŝipo jam plendis ĉar ne venis pacientoj al ili. *„Tio okazas, ĉar la usonaj kuracistoj ne iras, kiel la kubaj kaj venezuelaj, en la malriĉajn kvartalojn de la detruitaj regionoj, sed atendas sur sia ŝipo ke la pacientoj estas alportataj al ili”*, kritikis la ŝtatestro.

Ankaŭ la gvidanto de la itala katastrofprotekto kritikis, ke la armea agado de Usono estas senefika kaj preteras la bezonojn de la homoj. Guido Bertolaso, kiu gvidis 2009 la helpon post la tertremo en la Abrucoj, nomis la usonan arme-operacion en Haiti impresan demonstradon de la nord-amerika potenco, kiu habas tamen nenion komunan kun la reala situacio de la homoj. Malgraŭ tio, ankaŭ la Eŭropa Unio volas ĉeesti en Haiti kaj sendas polican unuon en la tertremregionon. Ĝi ampleksos proksimume 350 arme-policistojn, kiel lunde sciiĝis marĝene de la renkontiĝo de la EU-minsitroj pri eksterlandaj aferoj en Bruselo. En la kanada Montrealo, donacontaj landoj volas diskuti pri la rekonstruado post la tertremo, ĉe kiu laŭ plej lastdataj taksoj proksimume 150.000 homoj pereis.[1]

La registaro de Norvegio siavice kalkulas kun la kubaj kuracistoj en la tertrema regiono kaj transkontigis monon en valoro de 610.000 eŭroj kiel urĝa helpo por Haitio al Havano. Kiel la kuba taggazeto *Juventud Rebelde* raportis dimanĉe, interkonsento inter la norvega ambasadejo en Havano kaj la ministrejo pri eksterlandaj aferoj planas ke per la mono oni aĉetos medikamentojn kaj ekipaĵojn kaj disponigos ilin al la pli ol 400 kubaj kuracistoj en Haitio. La Societo pri Amikeco FRG-Kubo uzis tiun interkonsenton por siavice alvoki al subteno de la kubaj kuracistoj. „Kubo faras helpon kiu vere alvenas. La kuracistoj de Kubo laboros en Haitio ankoraŭ kiam Haitio delonge malaperis el la titolpaĝoj. Pro tio, helpu Kubon helpi”, legeblas en alvoko kiun la solidarecorganizo disvastigis lastan semajnfinon.

*El: „Junge Welt”, Berlino, 25-an de januaro 2010*

*

1 La nombro da pereintoj pro la haitia tertremo estas intertempe oficiale taksata je proksimume 200.000. -vl

## Jean-Guy ALLARD: Kaj kiam oni inventaros la teroristojn instalitajn en Usono ?

### Jen eta listo de teroristoj kiujn Usono gastigas en sia teritorio

Usono kiu pretendas trovi, en absurda maniero, teroristojn de Al-Kajdo en flugoj el Kubo, estas la rifuĝejo de grava kolonio de teroristoj, de torturistoj kaj de murdistaj prezidintoj.

Krom esti iniciatinta, orientinta, financinta kaj mastruminta la terorismon kontraŭ Kubo pere de siaj informagentejoj aŭ siaj mafiaj grupoj de Miamo kiujn ĝi mem starigis, Usono subtenis, patronis aŭ inspiris kontraŭleĝajn agadojn en la tuta kontinento kaj poste gastigis la farintojn.

De Luis Posada Carriles kaj Orlando Bosch, konfesintaj kaŭzintoj de la dumfluga detruo de la kuba aviadilo en 1976 kiu kaŭzis la morton de ĝiaj 73 flugantoj, ĝis la farintoj de terorismaj agoj kontraŭ progresemaj registaroj de la hodiaŭa Latinameriko, Vaŝingtono estis neniam surprizita de la apero sur sia teritorio de la farintoj de mortigaj konspiroj aŭ de individuoj trejnitaj aŭ rekrutitaj de siaj informservoj por semi la morton.

Koncerne Posada Carriles, Intereto estas plena de liaj konfesoj kaj rakontoj de liaj krimoj ĉu kiel trejnisto de teroristoj en la Everglades, kiel komisaro Basile en Karakaso, kiel komercisto de fidrogoj liveranta armilojn al la nikaragva Contra aŭ kiel aŭtoro de diversaj murdoplanoj aŭ iniciatinto de terorismaj agoj en kuba teritorio.

Pri lia komplico Orlando Bosch, psiĥopata pediatro, la arĥivoj de la 1960-aj jaroj de la miama gazetaro spegulas sen grandaj skrupuloj liajn pretenditajn heroaĵojn kiel ĉefo de la terorista MRR, de la „Kontraŭkomunista Kuba Armeo” aŭ de la „Kuba Agado”. Li estis la ĉefo, ĉiam laŭ decido de la CIA, de la Coordinadora de Organizaciones Revolucionarias Unidas (CORU), kies operacioj estis inter la plej sangaj de la tuta historio de terorismo sur tiu ĉi kontinento.

La 28-an de julio 1960, Bosch venis al Miamo kun 30-taga vizo. Sed 50 jarojn poste, primonante la venezuelajn tribunalojn kaj profitante kiel Posada kaj pluraj aliaj la aktivan protekton de la CIA kaj de la mafiaj politikistoj, li kuracas sian intermitan kadukegecon en dometo de Hialeah.

**Senfina listo de murdistoj**

La listo estas senfina de teroristoj instalita hodiaŭ en Usono kiuj konspiris kaj agis kontraŭ Kubo per la teĥnikoj lernitaj en la teror-akademioj de Usono kaj kiuj daŭre profitas la komplicecon aŭ komplezon de la aparato kiu hodiaŭ redaktas landajn listojn.

Kun la falo de la porusona diktatoreco de Fulgencio Batista, la plej hororaj kubaj murdistoj kiaj Esteban Ventura, Rolando Masferrer, Julio Laurent kaj Pilar García, trovis tuj rifuĝejon en Florido, kie ili vivis en la plej granda lukso kun la mono prenita el la ŝtata trezoro antaŭ ol fuĝi el Kubo.

El la jaroj de la CIA-centro de Miamo, la multmiliona JM/WAVE, aperis la eksterordinara kontingento de gangsteroj kiun tiu agentejo recikligis post la fiasko en la Porkogolfo, en ŝlosilajn elementojn de siaj kontinentaj operacioj, kun la venezuela DISIP kiel en la sekreta polico de la ĉilia diktatoro Augusto Pinochet kaj en la supremaparatoj de diversaj reĝimoj al

kiuj ĝi donis nekonfeseblajn apogojn.

De la fratoj Novo Sampoll, Pedro Crispín Remón Rodríguez kaj Gaspar (Gasparito) Jiménez, ĝis Reinol Rodríguez, Antonio (Tony) Calatayud, Nelsy Ignacio Castro Matos, Roberto Martín Pérez kaj Sixto Reinaldo Aquit Manrique, Héctor Francisco Alfonso Ruiz, alinome Héctor Fabián kaj Ángel Alfonso Alemán, ili estas dekoj kaj dekoj da murdistoj kiuj vivas tie kun netuŝebla statuso.

**Pinochetaj murdistoj kaj venezuelaj puĉistoj**

La listo de tiuj teroristoj kaj torturistoj kaj de murdistaj prezidintoj gastigataj kaj protektataj de Usono estas ankoraŭ pli longa.

Ĝi longiĝas kun la torturistoj de la argentina arme-reĝimo ĝis la agentoj de Pinochet, ekz-e Michael Townly, murdinto, kun la fratoj Novo, de la ĉilia eksministro pri eksterlandaj aferoj Orlando Letelier.

Kiel multaj salvadoraj faŝistaj militistoj, la kapitano Álvaro Saravia, murdinto de Monsenjoro Oscar Arnulfo Romero, ĝuis la usonan gastamon.

Dungsoldatoj de la nikaragva Contra kaj de la Tonton Macoutes de Haitio aperas ankaŭ en tiu kompletigota inventaro kiu daŭre atendas enketon.

Konsidere la revolucian Venezuelon, en Miamo aperas torturistoj kiel Joaquín Chafardet, aŭtentaj faŝistoj kiel Salvador Romaní kaj Ricardo Koesling, la eksagentoj de la DISIP Johan Peña, Pedro Lander, José Antonio Guevara, kiuj partoprenis en la komploto por la murdo de la prokuroro Anderson, apud Patricia Poleo, ankaŭ rifuĝinta en Florido.

Carlos Andrés Pérez, unua respondeculo pri la subpremo kontraŭ la venezuela popolribelo de 1989 konata sub la nomo Caracazo, estas hodiaŭ ekzilinta en Usono.

Torturisto kaj murdisto de la sekreta polico sub Pérez, Henry López Sisco estas ligita al longa sinsekvo de murdoj, de malaperigoj kaj de ekscesoj faritaj en la 1970-aj jaroj por elimini grupojn de junaj ribeluloj.

Alfredo Peña, eksa urbestro de la ĉefurba distrikto de Karakaso, kiu fariĝis respondeca pri la murdoj okazintaj en tiu urbo en aprilo 2002, ankaŭ kaŝiĝas en Usono.

La puĉistoj Carlos Fernández, eksĉefo de Fedecámaras, kaj Daniel Romero, kiu estis publike leginta la dekreton kiu suspendis la Nacian Asembleon kaj la demokratiajn instituciojn, troviĝas ankaŭ en Florido.

Goni konspiras per la ŝtelitaj milionoj

La bolivia prezidinto Gonzalo Sánchez de Lozada (Goni) fariĝis respondeca pri genocida subpremo kontraŭ la popolo en 2003, kiu kaŭzis la morton de 67 civiluloj kaj pli de 300 vunditojn per kugloj.

En la usona teritorio, Goni dediĉas nun al financado de la movadoj kontraŭ la registaro de la prezidanto Evo Morales.

Hugo Achá Melgar, identigita kiel la reprezentanto en Bolivio de la Fondaĵo Human Rights (FHR), financisto de la terorista bando kaptita la 16-an de aprilo 2009 en Santa Cruz dum ĝi preparis la murdon de Evo, ankaŭ elektis la vojon al Usono kiel pluraj liaj komplicoj.

Sen ajna argumento Vaŝingtono fifamigas Kubon, dum ĝi restas kun krucitaj brakoj fronte al la konfesintaj teroristoj kaj apogantoj de teroro kiuj troviĝas interne de ĝiaj landlimoj.

**Jean-Guy ALLARD.**

*

## Daniel Mermet: Daniel Bensaïd forlasis nin *la 12-an de januaro 2010*

Ĝirafo en kampo de musoj. Jen kiel oni povus prezenti Daniel Bensaïd en la nuntempa intelekta pejzaĝo.

Kion mi diras, tio ne estas tre afabla por la musoj, estas vere. Sed, jam inter la musoj, vi rekonis BHL aŭ Finkielkraut aŭ Cohn Bendit, ... Nu, al ĉiu sian muson.

Miavice mi parolas pri Télérama. Je la morto de Daniel Bensaïd, Télérama titolis : „Pensado estingiĝis”. Sekvatage sur ilia retejo, ili korektis, ĝi fariĝis : „Pensisto estingiĝis”.

Sed trankviliĝu, kara Télérama, la pensisto kaj la pensado restas viglaj. Vi konfuzis viajn revojn kun la realo. Sciu ke la batalo daŭras !

Ho, kompreneble, la maljunaj sesdekokuloj[2] en rulseĝo ankoraŭ longe daŭrigos interbatali per lambastonoj pri Kronstadt kaj la amoj de Frida kaj Leo en la blua domo ĉe la monteto. Sed la batalo daŭras, ĝi mobiliziĝas por la Conti aŭ la Goodyear, ĝi batalas kontraŭ la privatigo de la Poŝto kaj kontraŭ la Profitigo, ĝi batalas por tio, kion li nomis „la eko-komunismo”. Bensaïd volis certigi la daŭrigon de la historio, li ne estis tia ulo kiu metas ambosojn en la poŝojn de la infanoj.

Kaj pro tio, mi konfesas ke mi uzis lin iomete, invitante lin al la radio.[3] Por diri : vidu, nia generacio, tio estas ne nur renegatoj, ne nur liberecanaj reklamistoj, ne nur socialdemokrataj ruinoj... Ne nur tiuj kiuj disvastigis la teologion de la senpoveco[4] kaj de rezignacio kaj kiuj instalis la timon en la koron de la socia sistemo. Tiuj kiuj persvadis nin ke ni povas nenion fari por nia estonteco, kaj – eĉ pli bone – kiuj kredigis al ni ke ĉiuj bataloj estis vanaj, se ili ne kondukis al gulago.

Jen la nerezisteblo pri kiu parolis Bensaïd. Rezisti al la nerezisteblo, tio estas rezisti al tiu rezignacio, tio estas rezisti al tiu cinika indiferento kiu pravigas la malegalecojn, la privatan alproprigon, la sovaĝecon de la sociaj rilatoj.

Fakte, Bensaïd neniam perdis la kompason de sia junaĝo. La vorton komunismo ekzemple. Li penis por liberigi tiun vorton el ĉiuj rubaĵoj kiujn la historio alkroĉis al ĝi. Kaj Markso ? Markso uzata de Jacques Attali, Alain Minc kaj Jozefo Stalino ... Kiel liberigi Markson el lia plumbomantelo ? Bensaïd pasigis sian vivon dirante al ni ke ĝuste tie troviĝas la instrumentoj, la leviloj kaj la municioj por ĉiuj kiuj ne rezignis pri la homa emancipiĝo.

Por Bensaïd, tiu emancipiĝo ne estas veto, ĝi estas evidento. Tiu emancipiĝo venas de malsupre. Oni ne faras la feliĉon de la popoloj kontraŭ ilia volo. Eĉ se oni estas ĉe la flanko de la subpremato, kaj ĉefe se oni estas ĉe la flanko de la subpremato ... Li ofte reparolis pri la „mememancipiĝo”.

Lia kompason li ricevis el la tuluza kafejo kie lia patrino kantis „La tempo de la ĉerizoj” kaj, kie lia patro, en la tirkesto de la verŝotablo, havis sian flavan stelon, memoraĵo de Drancy[5]. Lia akra deziro de egaleco venis de tie.

Nur, la egalecon, tiun ni deziras kun niaj mastroj. Evidente, la mastroj kaj la dominantoj multe malpli emas al egaleco kaj disdivido. Necesas kelkfoje tiri al ili la orelon, aŭ eĉ iom pafi al ili.

Ĉar, kiel diris *les Motivés* „Ne eblas interkonsenti”

Aŭ vi batalas kontraŭ la misuzoj de la kapitalismo dirante „alia kapitalismo eblas”, aŭ vi serĉas la vojojn kaj la rimedojn por renversi ĝin ...

Ne, la pensado ne estingiĝis, kaj ankaŭ ne la pensisto.

Kiel diris Bensaïd, „Almenaŭ por ŝpari al si la honton ne esti provinta”,

La batalo daŭras !

**Daniel MERMET.**

2 Sesdekokuloj (68-uloj), la homoj kiuj partoprenis en la studentaj ribeloj de la jaro 1968. -vl

3 Daniel Mermet respondecas pri la fama rubriko "Là-bas si j'y suis" de la franca ŝtata radio France Inter. -vl

4 Vd tamen la artikolon de Otto Meyer pri la teologio de liberigo, jene: http://mas-eo.org/article393.html

5 En la apudpariza urbo Drancy, estis transira koncentrejo, el kiu judoj estis deportataj al Aŭŝvico kaj aliaj eksterm-ejoj. -vl

*

## MAS-renkontiĝo dum la UK en Havano

Dum la Universala Kongreso en Havano, en julio 2010, okazos renkontiĝo de la MAS-anoj. Tago kaj horaro ankoraŭ ne fiksiĝis.

*

## Eldonindikoj

*Le Monde diplomatique en Esperanto* aperas rete, laŭ kontrakto kun la direktejo de la franca originalo, *Le Monde diplomatique*, en Parizo. Tiu ĉi eldono estas laŭokaza papera eldono sub la respondeco de la ĉefredaktisto de *Le Monde diplomatique en Esperanto*, Vilhelmo Lutermano, kies retadreso estas: <vlutermano@free.fr>. Ĝi estas prizorgita de la Monda Asembleo Socia (MAS), <http://mas-eo.org>.

La artikolon

La fotoj sur la titolpaĝo estas laŭ licenco de *Le Monde diplomatique*.

La enpaĝigo de ĉi numero estas prizorgita de MAS per OpenOffice 3.0.1 sub Mandriva Linukso 2010.0; presita en Bulgario, januaro 2010.

## La Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la sekvakolumne listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: http://mas-eo.org enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – 3 en 2007, 4 en 2008, 18 en 2009, 2 en 2010 – jen la lastaj, laŭ la vico de ilia apero:

– **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Kien Ĉinio?** Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj, trad. Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj** Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Eddy Raats:** La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, 2009

– **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj.** Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Pereyra (Alvera), 2009.

– **Kien Ĉinio? Dek du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Karlo Markso: La mizero de la filozofio,** respondo al J.B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj – Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj**, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1**, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo**, tradukoj de div. MAS-anoj, 2009

– **Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 2**, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **La homo kaj lia naturo. La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Eseoj** elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: La kapitalo, Kritiko de la politika ekonomio, Unua volumo, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010.

– **Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo** kaj aliaj verketoj, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010.

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).